

julio-aŭgusto 1971

64-a jaro

n-ro 788 (7-8)

esperanto

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



TV-kurso
en Nederlando

Vi trovos

en ĉi tiu numero aktualan ĉefartikolon pri la lingva situacio en la plivastiĝonta (tiel ĉiuj antaŭvidas) Eŭropa Ekonomia Komunumo. Intertempe leviĝis en Francujo novaj voĉoj, kiuj postulas, ke la lingva problemo konkrete eniru la tagordon de la negocoj. Pro tiu lingvo-politika fono la Universala Kongreso en Londono havas ŝancon serioze kapti publikan atenton, kaj precipe la Informaj Fakoj en la landoj de EEK devos streĉi ĉiujn fortojn por interesi pri ĝi sian landan gazetaron.

Forta polemiko — kvankam feliĉe ne pri lingvaj interesoj — ne estas nekonata interne de la Esperanto-movado. La artikolo de prof. Lapenna sur la paĝoj 124—128 estas respondo al kelkaj lastatempaj skribaĵoj de la gazeto "Heroldo de Esperanto".

Enhavo

- 121 Eŭropo disputas pri siaj lingvoj
- 122 Grabowski, ĝuste antaŭ 50 jaroj (Delcourt)
- 123 Modela kongreso de fervojistoj
- 124 Kritika prezento de misprezenta "kritiko" (Lapenna)
- 129 Recenzoj
- 129 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 132 Loke — Fake (mallongaj novaĵoj)
- 133 Komenco bona — ĉio bona
- 134 Lerneja Bulteno n-ro 20
- 136 57-a Universala Kongreso, Portland (Oregon), Usono
- 136 Organiza potenco (Bakker)
- 137 Du seminarioj en Eŭropo (TEJO-paĝo)
- 138 Oficiala komuniko de la Akademio
- 138 Nekrologoj
- 139 Oficiala informilo: n-ro 447
- 140 Kalendaro
- 140 Anoncetoj

La kovrilo

La du nederlandaj komediistoj Kees van Kooten kaj Wim de Bie — konataj precipe en televido — havas seriozan reputacion kiel satiristoj. Ĉu kiel skoltoj, ĉu kiel viktimoj de ŝiprompiĝo (kiel ili projektas por la Esperanto-kurso de Teleac), ili scipovas entuziasmi la publikon. Ĝuste tion esperas la institucio, kiu petis ilin projekti la televidan kurson de Esperanto, prezentotan en la nederlanda TV. Ili studas la lingvon speciale por tiu celo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910). Ĉefredaktoro: V. Sadler. Redaktoro: f-ino A. Nagata. Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo). Aperas monate (escepte de aŭgusto). Abonprezo por unu kalendaro jaro: 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Aŭstralio, Nov-Zel-do 13,75; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Isr. 2,75 gld. Anonc-tarifo: 1 p. 285 gld., 1/2 p. 150 gld., 1/4 p. 85 gld., 1/8 p. 50 gld. 1/16 p. 35 gld. Ripet-rabato 20%. Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001. Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA). Telefono: (010) 36 15 39. Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM. Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA. Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando. Legantoj en 89 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: E.L.M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.G.


Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: U.J. Moritz, D-511 Alsdorf, Blumenstr. 7, F.R. Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris 17^e, Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uściński, Poŝtkesto 100, Warszawa-12, Pollando.

Estrarano pri financoj kaj administrado: E.J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Eŭropo disputas pri siaj lingvoj



La centra oficejo de EEK en Bruselo

La oficiala negocado pri la plivastigo de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (Komuna Merkato) ĝis nun ne tuŝis la problemon de oficialaj lingvoj. Tamen tiu problemo neniel estas forgesita, kiel evidentiĝas el la eldiroj kaj diskutoj en la gazetaro dum la lastaj semajnoj.

Por ke la ĝisnuna situacio estu klara, necesas menciigi, ke en la nuna EEK ekzistas kvar egalrangaj oficialaj lingvoj: la germana, franca, itala kaj nederlanda. En la praktiko, kiam temas pri malpli gravaj dokumentoj aŭ pri mallarĝaj diskutoj, la franca lingvo estas la plej ofte uzata. Tiun situacion la franca registaro dezirus firmigi per tio, ke la franca lingvo fariĝus 'labora' lingvo, dum la aliaj restus nur 'oficialaj'.

Antaŭ la traktadoj inter la brita ĉefministro Heath kaj la franca prezidanto Pompidou, subite komenciĝis vigla publika debato pri la estonta 'lingvo de Eŭropo'. Lanĉis ĝin Pompidou mem en intervjuo por la brita televido, la 17an de majo. Li diris: 'La franca estas la ĉefa laborlingvo en la Eŭropo de la Ses [= la EEK — noto de la red.] ... Mi esperas, ke tiu rolo de la franca restos agnoskita en la Komunumo. Finfine, la angla estas la lingvo ne nur de Britujo sed ankaŭ de Usono. Kaj se Eŭropo volas fariĝi si mem, ĝi devas distingiĝi disde Usono.'

Tiun deklaron sekvis longa artikolo en la franca ĵurnalo *Le Monde* de Jean Charbonnel, prezidanto de la financa komisiono de la Nacia Asembleo. Laŭ li, la diversaj kulturoj de Eŭropo estas 'minacataj de kreskanta anglo-saksa ondo'. Komuna lingvo por Eŭropo estas 'neceso' kaj 'nemalhavebla faktoro por kohereco'. 'Sole la franca lingvo povas esti tiu ilo privilegiita', ĉar ĝi estas riĉa kaj klara, kun malnova kaj evoluinta kulturo, kaj kunligas Eŭropon kun aliaj kontinentoj. La franca kiel lingvo de Eŭropo helpus, laŭ Charbonnel, protekti la aliajn eŭropajn lingvojn kontraŭ la minaco de la angla. 'Sume, ne ŝajnas malmodeste deziri, ke la eniro de Britujo en la eŭropan Komunumon okazu nur je tiu prezo'. Charbonnel ofte reprezentas la vidpunktojn de la gaŭlista movado pri eksterlandaj aferoj.

Sekvis intervjuo de la belga gazeto *Le Soir*, en kiu la franca prezidanto Pompidou ripetis sian starpunkton kaj diris: 'Mi ne volas postuli, ke Eŭropo estu franca, nek ke ĝi parolu france, sed mi opinias, ke, se morgaŭ Britujo estos ano de la Komuna Merkato (kaj tion mi opinias verŝajna), tre bone povos okazi, ke la franca lingvo ne plu restos tio, kio ĝi estas hodiaŭ — la unua laborlingvo de Eŭropo. Sed tiam Eŭropo ne plu estus tute eŭropa. Ĉar la angla ja ne estas nur la lingvo de Britujo, ĝi estas unuavice por la tuta mondo la lingvo de Usono.'

Longa artikolo en la nederlanda ĵurnalo *Algemeen Handelsblad* — *NRC* la 18an de majo raportis, ke 35 elstaraj francaj kleruloj, inter kiuj multaj membroj de la Franca Akademio, sendis alarmleteron al Pom-

pidou, postulante garantiojn pri la pozicio de la franca lingvo. Malgraŭ la skeptika tono de la nederlanda artikolo, ĝi konkludas, ke la argumento, ke la akcepto de la franca lingvo povus savi la aliajn eŭropajn lingvojn antaŭ la minaco de la angla, 'tamen ne estas tiel stulta'.

La reagoj en Britujo estis antaŭvideblaj. La antaŭa kabinetministro Arthur Bottemley atakis prezidanton Pompidou kolere pro la aserto, ke la angla estas la lingvo ankaŭ de Usono. Li deklaris: 'La angla estas la lingvo de la mondo. Kian rajton havas la francoj, tiel arogante opinii, ke la franca estas la lingvo de Eŭropo?' (Sen komento!)


La skota gazeto *Scotsman* respondis al Pompidou per ĉefartikolo — en la franca lingvo. Ĝi nomis lin lingva ŝovinisto. 'Ni ne komprenas kial, akceptante la francan kiel la solan lingvon de la eŭropa komunumo, ni montrus nin pli eŭropaj. Ekzistas nenio kialo, ke la lingvo de Shakespeare kaj la lingvo de Proust ne estu egalrajtaj kunuloj.' La angla *Guardian* opiniis (21an de majo), ke 'en poliglota mondo Eŭropo bezonas ambaŭ lingvojn same certe, kiel biciklo bezonas du radojn.' Pri la ideo, ke la angla ne estas sufiĉe eŭropa, ĉar ĝi estas la lingvo ankaŭ de Usono, *Guardian* atentigis, ke la franca estas ankaŭ la lingvo de Kebeko. La brita humura gazeto *Punch* memorigis, ke pli ol 120 milionoj da homoj parolas la germanan kiel sian gepatran lingvon. Do kial Eŭropo ne povus same bone 'distingiĝi disde Usono' per uzado de la germana? *Punch* prognozis: 'Eble Eŭropo post tridek jaroj havos novan lingvon — bazitan sur la angla-usona sed enpreninta ĉiaspecajn allogajn frazojn francajn, germanajn, italiajn — kiu estos ĝenerale akceptita kaj komprenata'.

Post tiom da opinioj, estis ioma seniluziigo por ĉiuj, kiam montriĝis, ke Heath kaj Pompidou en siaj diskutoj tute ne tuŝis la lingvan demandon. Verŝajne sufiĉis al ili la persona lingva problemo, ĉar neniu el ili scias sufiĉe la lingvon de la alia por povi paroli sen interpretisto.

Pledo por Esperanto aperis en pluraj el la ĉefaj ĵurnaloj de Nederlando de la 28a kaj 29a de majo, subskribita de 'Agadgrupo kontraŭ Lingva Imperiismo' en Amsterdam. Sendube la nuna internacia etoso permesas trafe argumenti por la internacia Lingvo, kaj tial la venonta Forumo pri la rolo de la grandaj naciaj lingvoj kaj la neŭtrala Esperanto, okazonta en la kadro de la Universala Kongreso en Londono, apenaŭ povus okazi en pli oportuna tempo.

V.S.

Lastmomente: Jam venis la unua akcepto de la invitoj al la supremenciita Forumo: reprezentiĝos la ĉefa instanco por disvastigo de la angla lingvo, *British Council*. Samtempe pluraj internaciaj neregistaraj organizaĵoj sciigis, ke ili intencas reprezentiĝi en la Kongreso en Londono.



GRABOWSKI, ĜUSTE

La kvindekjara datreveno de la morto de Antoni Grabowski (n. 11.6. 1857, m. 4.7.1921) estas konvena okazo por omaĝi — per ĉi tiu artikolo de Marcel Delcourt — unu el la ĉefaj kolonoj de la frutempa Esperanto-movado kaj unu el la senmortaj figuroj de la Esperanta literaturo: majstran manipulanton de la lingvo, kies tradukoj, precipe "Sinjoro Tadeo", restas ĝis hodiaŭ plezure legeblaj, vivaj kaj emociaj.

Estis sufoka atmosfero en Varsovio la trian tagon de julio 1921.

Antoni Grabowski, kiu jam de kelkaj jaroj tre suferis je la koro, dezirante spiri iom eble pli freŝan aeron, forlasis la hejmon de la strato Hoża por promeni lante nun, kiam la suno ekmalaltiĝas.

De Volapuko al Esperanto

Doloro memorigis lin, ke lia plej intima amiko d-ro Zamenhof spertis la saman turmenton. Nur antaŭ iom pli ol 4 jaroj ĉi tiu forpasis, sed konstante li pensis pri li, pri la por li neforgesebla tago, kiam en 1888, veninte Varsovion, li vizitis d-ron Zamenhof; pri tio, kiel inter ili ambaŭ eksonis la plej unua konversacio Esperanta, kiel fluis la lingvo, ĉar viva ĝi estis en iliaj koroj kaj mensoj.

Nur kelkajn monatojn antaŭe, somere 1887, li aĉetis en Toruń la ĵus aperintan unuan libron de d-ro Esperanto. Li ja sciis plurajn dekojn da lingvoj, kaj post kelkfoja tralego de la 16 fundamentaj reguloj kaj de la 900 radikoj, kiujn li konis el aliaj lingvoj, li estis lerninta la tutan lingvon kaj skribis al d-ro Esperanto gratulan leteron por esprimi sian profundan kredon pri la venko de lia verko. Kiel respondon li ricevis ĝentilan leteron de la aŭtoro, kiu konfesis sian veran nomon. Senprokraste do li sciigis la vian volapukan klubon, kies membro li estis, pri la naskiĝo de la "vera lingvo internacia".

Kaj li rememoris ĉion postan: de kiam, forlasinte Bohemion por ofici kiel fabrika direktoro en Rusujo, li parkeris ruse la noveleto de Puŝkin *Neĝa blovado* kaj samtempe tradukis ĝin en Esperanton, forĝante la necesajn vortojn, ne sciante, ĉu liaj derivaĵoj eniros iam en komunan uzadon; ja iuj kiel "pikradetoj", "atendema" estis poste elpuŝitaj de novaj radikoj (spronoj, pacienca).... Kaj poste li tradukadis el la germana *Gefratoj*, el la franca fragmenton el *La mizeruloj*, kiu nepresita perdiĝis, el la pola *Janko muzikanto* ... ktp. Iel fiere li rigardis nun tiujn modestajn kajerojn, kiujn sekvos tiom da ĉiam pli ampleksaj libroj.

Peko de juneco

Li rememoris ankaŭ, kiel "malatendema" li estis tiutempe; li ne komprenis, kial la lingvo ne disvastiĝis pli rapide, ĉu pro iaj malperfektaĵoj? Ja li perceptis

iujn mankojn, li mem sentis sin tute kapabla fari kelkajn modifojn.

Kiom for en la tempo aspektas nun la propono, kiun li faris al d-ro Zamenhof, forigi la tro oftajn "-oj", "-aj", "-ojn", "-ajn"! Li bedaŭris tion baldaŭ poste. *La liro*, kiun li eldonigis en julio 1893, aspektas nun al li kvazaŭ peko de juneco pro herezaĵoj, kaj li pentis pri la alvoko "Al la esperantistoj", kiun li aperigis en la januara numero de 1894 de *Esperantisto*. Decide, li fidelos al sia amiko kaj voĉdonos kontraŭ la reformoj. Kaj svarme kalejdoskopas plu en lia spirito lia tuta aktiveco en la movado, por la literaturo, por la poezio ... la ebloj perfektigi la lingvon kuŝas en ĝia strukturo mem, kaj li elmontru tion.

"Traduku la tutaĵon."

Li memoris kiel fervore d-ro Zamenhof instigis lin daŭrigi la tradukon de la ĉefverko de Mickiewicz *Sinjoro Tadeo*; "Traduku la tutaĵon" — kaj li ridetis, ĉar tio aspektis al li kvazaŭ neblaĵo.

Poste jen alvenis la teruraj jaroj: mortis lia plej amata amiko, venis milito kaj pro ĝi lia disiĝo disde siaj karaj edzino kaj geinfanoj; revenis en lia cerbo la poemo, kiun li verkis tiam:

LA DISIGITAJ

*Ne skribu! Mi malgajas kaj volus min estingi;
La belsomero estas, sen vi, amad' sen flamo,
Mi fermis brakojn, kiuj ne povas vin atingi;
Kaj frapi mian koron, aŭ tombon, estas samo,
Ne skribu!*

*Ne skribu! Tutforgesu ni unu pri alia;
Demandu vin kaj Dion pri mia kor-sopiro;
Ke vi min amas, aŭdi tra silentado via,
Ĉiel' — aŭskulto estas, neniam ĉieliro.
Ne skribu!*

*Ne skribu! Mi vin timas, mi timas la memoron
De via klara voĉo, min ofte alvokanta
Al ne povanto trinki ne montru viv-likvoron;
Skribaĵo kara estas portreto plenvivanta.
Ne skribu!*

*Ne skribu! Du vortetojn mi legi ne kuraĝas;
Kaj ŝajne voĉo ilin al mia kor' murmuras,
Kaj tra rideto via brilante ili naĝas,
Kaj ŝajne kiso ilin sur mia kor' gravuras
Ne skribu!*

MARCEL
DELCOURT

NTAŬ 50 JAROJ

En sia izoliteco amarajn sentojn li provis kontraŭbatali, kaj li strebis al mempacigo, al memkonsoligo por plenumi la lastan deziron de sia amiko: — traduki la tutaĵon.

Li finsukcesis, kaj dume la gekaruloj revenis.

Tiel pripensante, li alvenis antaŭ la montrofenestro de la antaŭ nelonge starigita Esperanto-oficejo. Nebuliĝis liaj okuloj, malprecize li povis legi titolojn kaj aŭtornomojn de la multaj ekspozitaj libroj kaj broŝuroj; meze, kvazaŭ parade, jen "Sinjoro Tadeo", la broŝuraĵo estas difektita, la postmilita ligna papero malbona; mankis la ilustraĵoj de Andriolli, kiujn li volis aldoni....

Sed jen denove akuta doloro en la brusto, la gamboj fleksiĝas, alia dolorego....

Pro kor-stenozo mortis subite sur la strato Antoni Grabowski, patro de nia poezio, post plenumita tasko.

Marcel Delcourt

Modela kongreso de fervojistoj

Kun 3050 membroj Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), la plej granda el la fakaj organizaĵoj, aliĝintaj al aŭ kunlaborantaj kun UEA, havis sian kongreson ĉi-jare en Maribor (Jugoslavio) de la 15a ĝis la 21a de majo. La kongreson ĉeestis sepcent personoj el 18 eŭropaj nacioj kaj salutis en la nomo de UEA s-ino Emilija Lapenna, ĉefdelegitino por Jugoslavio.

Supozeble ne malmultaj esperantistoj renkontis hazarde en vagonaro, ĉu survoje al UK, ĉu al feriejo, fervojistojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon. Kial fervojistoj estas — ĝenerale dirite — pli konsciaj pri la lingva problemo, ol la alifakaj profesiuloj? Verŝajne la malŝlosilo kuŝas ĉe internaciaj vagonaroj, kiuj kuras eĉ en unu tago tra pluraj landaj kaj lingvaj limoj. Ĉiuokaze ekzistas neniu alia fako pli vigla ol la fervojista, kiu eldonas regule plurajn revuojn en Esperanto; krom dumonata gazeto *Internacia fervojisto*, eldonata de IFEF, aperas la organoj de la aŭstra, franca, germana, hungara, itala, nederlanda kaj norvega esperantistaj fervojistaroj.

Do, kia estis la ĉi-jara kongreso de IFEF? Unuavice la kongresanoj povis ĝui senpagan fervojan vojaĝon per unuaklasa vagono tra Jugoslavio dum unu monato. La dorsoflanko de la kongresa karto validis kiel senpaga bileto. Ankaŭ Bulgarujo kaj Hungarujo jam donis similajn senpagajn biletojn al IFEF-kongresanoj, sed ne por tiel longa periodo.

Okaze de la kongreso aperis fervojista terminaro 130-paĝa en Esperanto kaj la serbokroata lingvo, de inĝ. Sekereŝ. Ankaŭ rilate al terminaroj la fervojista medio havas pli da aktiveco, ol la aliaj fakoj, almenaŭ ĝis nun. Pli frue aperintaj estas fervojaj Esperanto-terminaroj en la lingvoj germana, hungara kaj norvega, krom nur-Esperanta terminaro kaj serbokroata frazararo. Ĉi-foje tri fervojistoj-esperantistoj (s-roj Blondeaux, Ritterspach kaj Zupaniĉ) ricevis arĝentan medalon pro sia terminara laboro, de la Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektuloj Fervojistaj Societoj (IFAIFS; konata france kiel FISAIC), kies reprezentanto s-ro Gilles ĉeestis la tutan kongreson kiel observanto. Akcentinde estas, ke IFAIFS estas ne esperantista, sed ĝenerala internacia organizaĵo, kiu ligas fervojistojn de pluraj nacioj.

Kvankam prokrastite, la urbo Maribor dum la IFEF-kongreso intencis doni al placo nomon "Placo de Rudolf Rakuŝa". La prokrasto okazis pro administraj formalizaĵoj. (Intertempe la redakcio ricevis informon el urbo Ptuj, ke oni inaŭguris memortabulon de Rudolf Rakuŝa en Ormož apud Ptuj okaze de la 1-jara datreveno de lia morto.) Prof-o Rakuŝa estis membro de la Akademio de Esperanto kaj konata kiel pedagogo verkinta multajn pedagogiajn librojn.

La venontjara kongresurbo por IFEF, Lugano (Svislando), ĵus eldonis turisman kolorriĉan prospekton "Lugano".

EL "ESPERANTO", N-ro 7/8, 1921

"Lastmomente nin atingis la informo pri la morto de S-ro Antoni Grabowski, okazinta en Varsovio la 4 julio. La foririnto, amiko de nia Majstro, estis unu el la plej bonaj Esperantistaj verkistoj, Direktoro de la gramatika sekcio de la Akademio, Honora Prezidento de la Pola Esp. Societo, k.t.p."

EL "ESPERANTO", N-ro 9/10, 1921

Super la tombo de A. Grabowski

La Postmondana grupo de Esperantistoj ĉiam pli-grandiĝas... Foriras de ni tiuj, kies vivo surtera necesa por ni estas. Kaj jen kun ili elkorpiĝis vi, Sinjor' Antoni! ...Ĉe la sankta Pordego de la Pacmondo atendas vin, spiritiĝintan — nobla societo...

Portu de ni tien nian varmegan preĝon, kiu estu la atesto absoluta sur la juĝo Supera...

Dum via nobla Spirito ĝuos la eternecon, korpo restu trankvile en tero, kiu por vi malpeza estu!

Feliks Zamenhof

Al la traduko de "Sinjor' Tadeo" de A. Grabovski

Certigis Greka skeptikulo:
"Neebla estas la movado!" —
Ekstaris iu kaj silenta
Maljesis simple per irado!

Mond' diris: "Verso Esperanto
Neebla estas rid'-ideo!"
Ekstaris iu kaj genia
Respondis per "Sinjor' Tadeo"!

Leo Belmont

KRITIKA PREZENTIS

Jam dum jaroj *Heroldo de Esperanto*, kiu proklamis sin mem "organo de la Esperanto-Movado" (v. la subtitolon), regule publikigas, aldone al diversaj atakoj, ankaŭ nombron da misprezentoj en la recenzoj pri la Jarlibro de UEA, Dua Parto, kiu entenas la Estraran Raporton. Tion ĝi faras tiel sisteme kaj konsekvence, ke oni povas sen granda fantazio anticipe antaŭvidi la karakteron de la sekvantaj "recenzoj".

Ni tamen ne profetu la sekvantajn, sed limigu nin al la lasta, aperinta en n-ro 1 de la 16-a de januaro 1971, kaj verkita de s-ro G.C. Fighiera, pri kies opinio la redaktorino, s-ino Ada Fighiera, ne respondecas. Tiel almenaŭ estas skribite sub la titolo de la koncerna rubriko: "La redakcio ne respondecas pri la opinioj esprimitaj en la recenzoj."

Dum sia aprila kunsido la Estraro iom okupiĝis ankaŭ pri tiu teksto, konstatis, ke en ĝi denove troviĝas multaj misgvidaj asertoj, kiuj deformas la realon kaj komisiis min respondi en la organo de la Asocio.

Kial reagi?

Oni povus prave demandi, ĉu entute havas sencon perdi la tempon por reagi; ĉu ne estus pli bone tute simple ignori tiaspecan skribadon kaj fidi, ke tiuj legantoj de *Heroldo*, kiuj samtempe estas individuaj membroj de UEA, mem rimarkos la malĝustaĵojn kaj sekve forĵetos "kritikon" bazitan sur ili. Verŝajne tio okazas en la plimulto de la kazoj. Efektive, unuopaj membroj ofte en la pasinteco proteste skribis al *Heroldo*, aŭ riproĉis pro tio ĝian redakcion dum la ĝeneralaj kunvenoj de niaj kongresoj, sed *Heroldo* nek publikigis iliajn leterojn aŭ raportis pri la riproĉoj, nek ŝanĝis tiurilate sian linion. En 1967, dum la Universala Kongreso en Rotterdam, la tuta Komitato de UEA "unuanime, kun unu sindeteno, kondamnis tiaspecajn misprezentojn en *Heroldo*", kaj s-ro M. Jaumotte, la tiama prezidanto de la Societo *Heroldo*, eĉ "distancigis sin de la skribado en *Heroldo* kontraŭ UEA" (protokolo de la 8-a de aprilo 1967, pp. 14-15). Iom poste s-ro Jaumotte eĉ ekŝiĝis el tiu funkcio pro la sama kaŭzo. Tamen, *Heroldo* malatentis ankaŭ tion kaj daŭrigis sian vojon provante verŝi senĉese, guton post gutu, suspektojn kaj erarajn bildojn en la mensojn de siaj legantoj.

Por ĉiuj, kiuj iom atente sekvis la skribadon de *Heroldo*, la taktiko estas klara: konstrui muron de malkonfido inter la membraro kaj la demokrate elektitaj gvidaj instancoj de la Asocio; inter la Komitato kaj la Estraro; inter la Komitato aŭ Estraro kaj la Centra Oficejo; eĉ inter la unuopaj estraranoj kaj geoficistoj. La plej profundaj motivoj de tiu ĉi tuta misagado estas obskuraj sed la vera celo ne malfacile divenebla.

Por la aliaj — neinformitoj — necesas diri, ke ne temas pri unusola, izolita, kazo. Se estus tiel, neniuj saĝa persono venus al ideo reagi, ĉar ja povus temi pri ordinara, nemalica eraro de la redakcio. Fakte, ekde 1962, kiam la nuna redakcio transprenis tiun gazeton, ĝis la fino de 1969, en ĝi entute aperis minimume 230 atakoj (rektaj malveroj, duonveroj, misprezentoj, intencaj ellasoj, subfosoj, insultaj esprimoj, ekzemple "diktatoro", "kulto de personeco" k.s. stultaĵoj) kontraŭ UEA aŭ kelkaj el ĝiaj funkciuloj en 43 numeroj; minimume, ĉar en pluraj jarkolektoj

mankis deko da numeroj kaj sekve ne eblis kontroli ilin. Temas, do, ne pri hazarda eraro, sed pri sistema, laŭplana agado.

Estas ankaŭ utile memorigi, ke unu el la ĝeneralaj kunvenoj de la Universalaj Kongresoj ĉiam pritraktas la Estraran Raporton. En la lastaj jaroj la subskribinto insiste petis la ĉeestantojn — kaj absolute ĉiu kongresano rajtas ĉeesti kaj paroli — libere kritiki, eĉ plej akre, la Raporton, ĉar tie estas la loko por kritiki, se io estas kritikinda, kaj por eventuale doni respondojn. En Vieno okazis la samo. Kvankam la redaktorino de *Heroldo* ĉeestis, same kiel en la antaŭaj jaroj, ŝi aŭdigis eĉ ne unu solan vorton: nek kritikan, nek nekritikan. Tamen, nun *Heroldo* denove lanĉis atakon pro tiu sama jam diskutita Raporto por la j. 1969, kiun, cetere, la Komitato aprobis en Vieno dum publika kunveno per ĉiuj voĉoj kaj du sindetenoj. (Tion, kompreneble, *Heroldo* prisilentis.)

La ĉi-foja "kritiko" estas lerta miksaĵo — ne eblas ne rekoni la lertecon — de veroj kun samtempa prisilento de aliaj, esencaj, veroj, de duonveroj kaj rektaj malveroj. Ĝi estas farita tiel ruze, ke eĉ atentaj kaj bonintencaj legantoj facile povus esti misgviditaj. Eĉ se troviĝis nur deko aŭ malpli da personoj, egale ĉu membroj de UEA aŭ ekster ĝiaj vicoj, kiuj pro tiu teksto ricevis grave deformitan bildon pri la financa situacio, administrado kaj rolo de la Asocio, estus utile ĝustigi. Tamen, ne tio estas esenca. Multe pli grava estas la spirito de defetismo*, kiun elvokas kaj nutras tiaspeca skribado, kaj kiu sendube malhelpas la laboron de batalanta organizaĵo kiel la nia. Ne pro *Heroldo*, sed ĝuste por haltigi tiun danĝeron kaj por preventi pli malbonajn sekvojn, necesas fine reagi.

Misgvidaj asertoj pri la spezoj

Unue, kio fakte estas misprezento?

Misprezenti signifas intence krei ĉe aliaj — en tiu ĉi kazo en la mensoj de la legantoj de *Heroldo* — per malveroj aŭ, eĉ pli malbone, per duonveroj falsan imagon pri faktoj aŭ fakta stato.

Kaj nun, laŭvice, ni koncize traktu la ĉefajn punktojn.

1. *Heroldo* asertas, ke "jam de multaj jaroj UEA elspezas pli multe ol ĝi enspezas". Se temas nur pri la enspezoj per kotizoj, abonoj kaj similaj regulaj enspezoj, kion *Heroldo* ne diras, tiu aserto estas ĝusta, sed nur parte. Parte tial, ĉar ne sole "jam de multaj jaroj", sed ekde la fondiĝo de UEA en 1908 ĝis la nuntempo bedaŭrinde la regulaj enspezoj, kun mal-

* defetismo = mensa stato, karakterizita per malfido pri venko en milito aŭ sukceso en entrepreno aŭ simile kaj per emo al kapitulaco aŭ rezigno. (red.)

NTO DE REZENTA "KRITIKO"

IVO
APENNA

oftaj esceptoj, neniam povis kovri la regulajn elspezojn. Du el la raraj esceptoj estis, ekzemple, la jaroj 1958 kaj 1959, kiam la subskribinto, aldone al aliaj taskoj, fakte okupiĝis ankaŭ pri la financoj de la Asocio (kia terura "kulto de personeco" pro simpla konstato de fakto!). Male, se temas pri ĉiuj enspezoj kaj entute pri la financa situacio de UEA, la aserto estas komplete malvera, pri kio poste.

2. Heroldo denove emfazas la "regulan plialtigon de la kotizoj ĝis 30% ĉiun duan aŭ trian jaron", sed diras eĉ ne unu solan vorton pri la inflacia, terura altiĝo de ĉiuj vivkostoj ĉie en la mondo. Apenaŭ estas imageble, ke la verkinto de tiu aserto nenion sciis pri la inflaciaj prezoj. En ĉiu okazo, la Komitato de UEA, kiu ja vivas sur tiu ĉi terglobo, sentis sin devigita, pli ol kontraŭvole, altigi la kotizojn por iel fronti la kapturan altiĝon de la kostoj. Pretere dirite, eĉ nun, post la lasta ioma altigo de la kotizoj en 1969 (precize 20%), la kotizoj de UEA restas pli malaltaj ol tiuj de similaj organizaĵoj, eĉ pli malaltaj ol la jarabono de Heroldo. La baza jarabono por tiu gazeto estas 15 guldenoj por 18 numeroj (72 grandformataj paĝoj); la MA kotizo de UEA estas 30 gld. kaj la membroj ricevas la revuon "Esperanto" kun entute 240 paĝoj (formato iom malpli granda ol duono de la formato de Heroldo) kaj la Jarlibron en du partoj kun entute 574 p. en 1970. Ĉiu, kiu disponas pri iom da tempo, povas kalkuli kaj mem konstati, ke la baza MA kotizo de UEA estas proksimume je kvarono *malpli alta* ol la jarabono al Heroldo, se oni prenas en konsideron nur la kvanton kaj karakteron de la kompostita kaj presita teksto, eĉ tute malatentante ĝian enhavon. Kial, do, daŭre akcentadi (Heroldo faris la samon plurfoje en la pasinteco) la "regulan plialtigon de kotizoj de UEA", se ne por krei la impreson, ke UEA facilanime malŝparas la monon de la membroj, kiun ili eble povus pli racie elspezi, ekzemple por abonado de Heroldo, kies abono restas "senŝanĝa" (tre dikaj literoj, n-ro de la 1-a de septembro 1969, la sama, en kiu Heroldo per dikaj literoj informis pri la lasta altigo de la kotizoj de UEA en Helsinkio!). Kaj, tamen, espereble eĉ la redakcio de Heroldo rekonos, ke ja ekzistas diferenco inter Heroldo kaj UEA. Dum la nura devo de la proprietuloj de Heroldo estas liveri al la abonantoj la gazeton por 15 gld. jare, la gamo de la taskoj de UEA, kiujn ĝiaj organoj sur diversaj niveloj klopodas konscie plenumi, estas vastega kaj etendiĝas de la delegita reto kaj diversaj aliaj praktikaj servoj, tra la eldonado de periodaĵoj, la valorega Jarlibro kaj aliaj publikaĵoj, ĝis diversaj aspektoj de konstanta informado, okazaj mondskalaj apartaj kampanjoj, subvencioj al CED, al TEJO, al la Akademio, ktp. Ankaŭ tion facile povas konstati ĉiu, kiu pretas legi la Estrarajn Raportojn kaj iomete mediti pri la kvanto kaj kvalito de laboro necesa por realigi ĉion ĉi.

Eĉ se la devo de UEA estus limigita sole al liverado de periodaĵoj kaj servoj al la membraro laŭ la diversaj kategorioj, la membroj abunde ricevus la ekvivalenton de la kotizvaloro, sed UEA devas fari kaj fakte faras multe pli. Cetere, *ni en UEA ne organiziĝis nur por ricevi, sed ĉefe por doni: por realigi per komunaj fortoj, organizite kaj se eble unuece, tiun grandan celon, kiun unuope kaj disrompite ni ne povas atingi.*

3. Heroldo asertas, ke "jam de multaj jaroj...la deficitoj kreskadis" kaj tiam ĝi donas informon pri la deficitoj — en la lastaj tri jaroj! Denove misgvida duonvero, ĉar ja estas vero, ke de 1967 ĝis 1969 la deficitoj kreskadis, sed ne estas vero, ke "jam de multaj jaroj" (ĉu ekde kiam la subskribinto fariĝis prezidanto de UEA, aŭ, eble, eĉ ekde 1955, kiam li estis elektita ĝenerala sekretario!?) ili kreskadis. Fakte, ili fluktuadis depende de aro da eksteraj kaj internaj faktoroj. Ekzemple, la deficitoj en 1962 ĝis 1964 kaj 1966 estis kelkfoje eĉ duoble pli altaj ol tiu en 1967, dum la deficitoj en 1965 estis multe pli alta ol la deficitoj de 1968.

La deficitoj de 42 166 gld. en 1969 ja estis altega. La esceptan grandecon kaŭzis parte la tro malaltaj kotizoj kompare kun la treege altiĝintaj kostoj (tial necesis altigi la kotizojn je 20% en Helsinkio), kaj parte la likvido de negativaj kontoj. Tiu deficitoj certe kaŭzis multe da zorgoj al la Estraro kaj al la Komitato. Por mi mem ĝi estis ne nur maltrankviliga, sed ankaŭ pli ol doloriga: persono, kiu dum pli ol 30 jaroj maksimume dediĉis siajn fortojn al UEA kiel la plej taŭga instrumento por disvastigo kaj venkigo de la Internacia Lingvo; kiu klopodis kaj grandparte sukcesis havigi al la Asocio ankaŭ konsiderindajn financajn rimedojn kaj kiu mem kontribuis laŭ siaj eblecoj, ne povas ne esti malfeliĉa en tia situacio. Tamen, inter tiaj zorgoj de la Estraro kaj Komitato, kiuj streĉas siajn fortojn por haltigi la malbonon, kaŭzitan de faktoroj ekster ilia kontrolo, kaj por preventi ripetiĝon, unuflanke, kaj defetisma subfosado, sen ia ajn pozitiva helpo, aliflanke, ankaŭ ekzistas diferenco. Grandega kaj esenca.

4. Heroldo asertas, ke "la komitataj revizoroj decidis ne proponi la malŝarĝon de la Estraro pro la financa gvidado de la Centra Oficejo (C.O.)". Denove misgvida kvaronvero ĉi-foje, ĉar (i) estas ellasitaj la vortoj "pro la granda deficitoj" (tiu por 1969) kaj (ii) la parteto "tiel ke la kongresa financa komisiono kaj la Komitato povas agi libere". Tio efektive okazis kaj la Komitato, ricevinte ĉiujn necesajn objektivajn informojn, *unanime* aprobis ne nur la bilancon, sed ankaŭ la spezkonton de UEA por 1969 (Protokolo, p. 9), kion, kompreneble, Heroldo ne diris.

5. En ligo kun tiu Raporto de la revizoroj Heroldo plue asertas, ke "tial ilia Raporto ne aperis en la Jarlibro", kaj evidente volas kredigi, ke UEA subpremis la aperigon de tiu Raporto por kaŝi ĝian enhavon al la membraro. Diference de la duonaj kaj kvaronaj veroj, tio ĉi estas komplete malvero. La Jarlibro kun la Estrara Raporto aperis komence de julio, dum la revizora Raporto, subskribita de nur unu revizoro, estis ricevita en la C.O. la 28-an de julio. La alia revizoro subskribis ĝin dum la kongreso. En UEA nenio

KRITIKA PREZENTO DE MISPREZENTA "KRITIKO"

(daŭrigo de p. 125)

estas farata kaŝe aŭ malantaŭ la dorso: interalie, ĉiu rajtas mem ĉeesti kaj persone aŭskulti la diskutojn kaj aŭdi la decidojn de la Komitato, ĉar ĝiaj konsidoj estas publikaj.

Kio pri la ĝenerala financa situacio de UEA?

Misgvidinte tiel siajn legantojn, Heroldo kondukas ilin rekte en la kvazaŭan abismon de la tuta financa situacio de UEA. Per *kursivaj* literoj ĝi presigis: "La problemo ne estas nur forigi la deficiton, sed eviti, ke la administraj kostoj kaj la internaj servoj absorbu preskaŭ la tutan asocian monon, kotizojn, donacojn kaj rezervojn." Kaj iom poste: "Nur pragmatismaj kriterioj povas haltigi la financon hemoragion."

Kompatinda UEA! Jen kion faris el ĝi — iam riĉa kaj potenca (!) — la nuna kaj estintaj estraroj de UEA, en kiuj ekde 1938, sed precipe "jam de multaj jaroj", daŭre troviĝas la subskribinto, kiun Heroldo ofte honorigis per "diktatoro", objekto de "kulto de personeco" kaj similaj afablaj titoloj. Do, UEA ne nur elspezis la kotizojn, sed eĉ "preskaŭ" la tutan asocian kapitalon, donacojn, ĉiujn rezervojn.... Post tiu terura hemoragio ĝi nun estas sensanga, kompreneble, reduktita al fragila* almozula bastoneto. Tamen, feliĉe por UEA kaj por la tuta Esperanto-movado en la posedo de Heroldo troviĝas unuaranga medikamento, kiun ĝi tute senpage disponigas: pragmatismaj metodoj.

Provizore ni lasu flanke la "pragmatismajn metodojn" — fakte, laŭ la opinio de Heroldo, likvidon de unu agado de UEA post la alia, verŝajne ĝis la likvido de UEA mem — ĉar ili espereble montriĝos pli ol necesaj post la senmaskigo de tiu gravega plia misprezento.

Unue mallonga ekskurseto en la historion. Estas jam menciite, ke ekde sia fondiĝo UEA preskaŭ senĉese havis deficitajn. Nur financa helpo de pli bonstataj kaj klarvidaj membroj ebligadis pagi ilin kaj finance vivteni la Asocion kaj ĝian laboron. La demando estas kiel: ĉu racie aŭ malŝpare. Jen karakterizaj ekzemploj.

Inter 1920 kaj 1933, kiam la sidejo de UEA estis en Ĝenevo kaj kiam ekzistis praktike neniam malfacilaĵoj por pagi la kotizojn de kiu ajn lando al la Centro, la tuta sumo de malprofitoj estis 120 000 sv.fr. (bv. konsideri la tiaman valoron de la franko!). La trista plia sorto de la ĝeneva UEA estas konata, kaj ne necesas komenti ĉi tie. Nur memori, ke post la formiĝo de la granda kapitalo Hodler, preskaŭ komplete, kaj pro manko de aliaj rimedoj necesis foriri el Ĝenevo kaj fondi Internacian Esperanto-Ligon (IEL).

La deficitaj de IEL, ekde 1947 denove UEA, en Heronsgate, variis, sed meze ili estis inter 100 kaj 400 pundoj jare. En tiu periodo la agadoj de UEA estis limigitaj kaj la nombro de ĉiuj membroj estis multe pli malalta, ekzemple 17 700 en 1948, ĉ. 16 000 en 1954, el kio ĉ. 6 000 individuaj. Ankaŭ tiam necesis kovri la deficitajn el la kapitala konto, kaj ankaŭ ti-

am la situacio estis malfacila, sed nekomparebla kun la ĝeneva periodo.

Ekde la fino de 1955 la sidejo troviĝas en Rotterdam. La agadoj de UEA senĉese vastiĝadis, kaj la nombro de la membroj daŭre kreskadis: pli ol 20 000 en 1955, pli ol 27 000 en 1958 kaj 33 769 en 1969. Por kovri la deficitajn necesis denove preni el la kapitala konto.

Estas pli ol evidente, ke la ŝlosilo por objektive taksati la financon estas precize la kapitala konto kaj la diversaj fondaĵoj. Tion Heroldo prisilentas aŭ komplete misprezantas. Jen, do, la vero, facile kontrolebla de kiu ajn membro aŭ nemembro.

En 1948 la kapitala konto estis 1 300 anglaj pundoj, la valoro de la domo en Heronsgate estis taksita je 2 000 pundoj kaj la Fondaĵo Hodler en Ĝenevo estis 17 500 sv.fr., sed nur teorie, ĉar poste montriĝis, ke ankaŭ tiu cifero estis malĝusta. Tamen, por niaj bezonoj ni prenu ĝin kiel ĝustan. Entute, do, la kapitala valoro estis ĉ. 50 000 *ned. gld.* (Tiu kaj la sekvan- taj ciferoj estas rondigitaj.)

En 1955, kiam la subskribinto fariĝis ĝenerala sekretario, la kapitala konto estis ĉ. 21 000 *gld.*, la nova Garantia Fondaĵo estis ĉ. 55 000 *gld.*, la Fondaĵo Hodler 15 500 sv.fr., dum la domo en Heronsgate estis vendita por la sumo de 4 150 pundoj kaj, post pago de la kostoj kaj diversaj fakturoj, restis la sumo de 3 000 pundoj. Entute, do, egalvaloro de ĉ. 121 000 *gld.*, kio signifas 71 000 *gld.* pli ol en 1948 malgraŭ la deficitaj kaj kostoj de translokiĝo el Britujo al Nederlando.

En 1964, kiam la subskribinto fariĝis prezidanto de la Asocio, la tuta asocia kapitalo estis 204 000 *gld.*, kaj en ĝi estis inkluzivitaj la antaŭaj apartaj fondaĵoj (garantia, Hodler, domo, kapitala konto), nun unui- gitaj.

En 1969, do en la ekzamenata jaro, la asocia kapitalo estis 241 000 *gld.* Do, dank' al pliaj heredaĵoj kaj libervolaj donacoj, ĝi denove kreskis kompare kun 1964 kaj preskaŭ duobliĝis kompare kun 1955. Fakte, la kapitalo, kune kun la diversaj fondaĵoj — kaj ankaŭ ilin oni devus kalkuli — sumiĝis je 264 000 *gld.* Krome, en la bilanco la valoro de la domo de UEA en Rotterdam estas taksita je 140 000 *gld.*, sed la fakta valoro de la nura grundo, senkonsidere al la valoro de la konstruaĵo, estas nun 186 000 *gld.* Aldone necesas preni en konsideron ankaŭ la grandan valoron de moderna oficeja ilaro kaj de la propraj kompostilo kaj fotoaparato, kiuj ebligas nun al UEA mem produkti la revuon, la Jarlibron, multajn dokumentojn de CED kaj aliajn presformajn materialojn pli bele, pli rapide kaj pli malmultekoste ol antaŭe. Ĉio ĉi estas aĉetita antaŭ nelonge, ĉefe per pliaj libervolaj donacoj de sindonaj personoj, kiuj aprezas la laboron de la Asocio kaj de ĝiaj funkciuloj. Fine, ekster la financoj de UEA, oni ne povas ne emfazi la grandan signifon de la Institucio Hodler 68, kiu atingis la sumon de 137 000 *gld.* kaj jam povis helpi al UEA per la profito de pli ol 7 000 *gld.* en 1970.

Tio estas la vero. Oni komparu ĝin kun la aludaj kalumnioj pri la "absorbado" de la "tuta asocia mono,

* fragila = malfortika. (red.)

kotizoj, donacoj kaj rezervoj". Efektive, UEA ne bezonas la recepton de "pragmatismaj kriterioj" de Heroldo.

Kion ĉio ĉi signifas? Kiel povis okazi, ke, malgraŭ la bedaŭrinde neeviteblaj deficitaj, kiuj devis esti kovrataj el la asocia kapitalo, tamen tiu rezerva kapitalo — diference de la katastrofa ĝeneva periodo — daŭre kreskis kaj, kompare kun 1948, preskaŭ kvinobligis? Laŭ mi, tio ŝuldiĝas unuavice al la trafa kaj efika laboro de la Asocio "jam de multaj jaroj", unuflanke, kaj al aprezado de tiu laboro fare de multaj pli bonstataj membroj, kiuj *ĝuste tial* helpis la agadojn de la Asocio per donacoj, ĉu por la kapitala konto, ĉu por specialaj celoj, aŭ heredigis al la Asocio partojn de siaj havaĵoj, aliflanke. Al la solida financa situacio de UEA certe kontribuis ankaŭ diversaj financaj iniciatoj de la Estraro, kies alvokoj havigis al la Asocio konsiderindajn sumojn, ekzemple (laŭmemore, tute rapide kaj ronde): 60 000 gld. por la "ĉambroj" en la domo de UEA, preskaŭ 20 000 gld. por la revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, ĉ. 30 000 gld. por CED en 20 jaroj, pli ol 12 000 gld. por la propra presejo, preskaŭ 130 000 gld. da donacoj kaj pruntoj por la Instituto Hodler 68, ktp., ktp. Ĉiuj ĉi iniciatoj — inkluzive la plej novan kampanjon "100 x 100 = 10 000" — estis "elpensitaj" de la Estraro aŭ, en la kazo de Hodler 68, de la antaŭa direktorino de la C.O.; tutcerte ne de Heroldo, kiu tiel sincere, lojale kaj helpeme skribas pri la financa situacio de UEA! Kaj, same certe, tiuj kaj multaj aliaj alvokoj restus seneĥaj, se la membraro ne estus kontenta pri la multflankaj kaj vastaj agadoj de UEA, kutime celtrafaj kaj ĉiam utilaj; se ĝi ne fidus je la gvidado kaj administrado de la Asocio; se ĝi ne vidus, ke la iniciatintoj ne nur alvokas la aliajn kontribui por difinitaj celoj, sed ankaŭ mem kiel la unuaj reagis je la propraj alvokoj per propraj kontribuoj. Kaj mi ankaŭ kuraĝas kredi — sen falsa modesteco — ke tiu fido estis kaj estas almenaŭ iomete konektita al iniciatoj, laboroj kaj realigoj ligitaj al mia nomo "jam de multaj jaroj". Precize inverse de tio, kion Heroldo dezirus kredi al siaj legantoj.

Implicitaj malveroj

Ĝis la nuna momento estas kritike analizita proksimume nur unu triono de la misprezenta "kritiko". La aliaj du trionoj entenas eĉ pli da malĝustaĵoj, sed ili fariĝas relative sensignifaj post la supra senmaskigo de la bazaj. Tial ni limigos nin en tiu ĉi ĉapitro nur al 3-4 tipaj misprezentoj per implicitaj malveroj. Tiu metodo de Heroldo konsistas en kvazaŭe bonintencasugestado, ke io devus esti farata, implicante kaj kredigante tiel, ke ĝi ne estas farata; aŭ inverse: ke io devus esti nefarata, kvazaŭ ĝi estus farata.

1. Ekzemple, Heroldo proponas: "urĝas helpi la junularon en maniero pli efika ol nun sen altrudi al ĝi apartan gvidlinion". Pro tiuj du implicitaj malveroj la leganto ricevas du falsajn impresojn: (i) UEA ne sufiĉe subtenas la junularon, (ii) UEA altrudas al ĝi apartan gvidlinion. Fakte, TEJO estas sekcio, do konsista parto de UEA kaj ĝi ricevas maksimuman eblan apogon en formo de subvencio, amaso da teknika kaj administra helpo en la C.O., konsiderinde rabatitaj kotizoj de UEA por gejunuloj, malpli ol tri-

ona kongreskotizo por personoj ĝis inkluzive 20-jaraj, regula rubriko en "Esperanto", senpagaj ejoj dum la universalaj kongresoj, oratoraj konkursoj kun monpremioj ktp. Nek la Estraro, nek kiu ajn alia organo de UEA iam ajn altrudis al TEJO kian ajn gvidlinion: nek apartan, nek neapartan; nek rilate ĝian ĝeneralan agadon, nek koncerne la programojn de ĝiaj kongresoj aŭ aliaj aranĝoj. Pli kompleta sendependeco — fakte tro granda kaj kontraŭa al la pozicio de sekcio — ne estas imagebla.

2. Alia ekzemplo: Heroldo asertas, ke "pli aŭ malpli frue oni komprenos, ke administra malcentrigo estas imperativo por Movado kiel la nia" kaj emfazas, ke "pli frue ... eĉ la redaktado de la revuo kaj la kongresa administrado okazis ekster la C.O.". Per tio ĝi kredigas, ke ne nur la redaktado de la revuo kaj la administrado de la kongresoj, sed absolute ĉio estas centrigitaj en la C.O. Efektive, la redaktado de la revuo estas tiel ligita al la ĝenerala agado de la Asocio, ke, eĉ se oni povus trovi vere kapablajn redaktorojn pretajn plenumi la laboron ekster la Centra Oficejo — kio ja kelkfoje okazis en la pasinteco — montriĝis pli utile redakti ĝin en la C.O. Tio sendube estas unu el la faktoroj, kiuj kaŭzis ĝian nunan altan nivelon. Same tiel la spertoj montris, ke estas pli simple kaj pli utile prizorgi la teknikan administradon de la kongresoj en la C.O., lasante al la LKK vastan kampon de agadoj en la kongresa urbo kaj grandan parton de la kongresa programo. Tamen, en la nuna UEA tre multaj agadoj estas malcentrigitaj: ĉiuj taskoj de unuopaj estraranoj, la agadoj sur la kampo de informado, koresponda, lingva kaj aliaj servoj, diversaj komisionoj ktp. Kaj kio pri CED, kies londona oficejo plenumas, aldone al ĉiuj siaj multflankaj propraj taskoj, ankaŭ diversajn aliajn, pri kiuj estas ŝarĝita la subskribinto: eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA, parte ankaŭ informado. Ĉio ĉi okazas ekster la C.O. kaj kostas al UEA, fakte al ĝia propaganda konto, la pli ol minimuman sumon de ĉ. 500-600 pundoj jare, praktike la sama en la lastaj pli ol 20 jaroj ekde la fondiĝo de CED. Por ioma orientiĝo de la legantoj estas utile diri, ke unu el la neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun Unesko elspezas jare 5 200 pundojn nur por vivteni tiujn rilatojn, laŭ aldone al dokumento de *World Association for Christian Communication* de septembro, 1970. Tamen, pri tiuj "malcentrigitaj" abundaj laboroj Heroldo skribas nenion.

3. Plia ekzemplo: Heroldo asertas — post kiam ĝi tiel brile senigis UEA-n de la tuta mono (*tiel!*) — ke "restas preskaŭ nenio por la disvastigo de Esperanto en mondaj kadroj". Implicite Heroldo provas kredigi al siaj legantoj — espereble nur al la plej naivaj — ke UEA faras nenion sur la kampo de monda informado. La vero estas, ke miloj da artikoloj kaj informoj en la gazetaro, radio-elsendoj kaj televidaj programoj, ekspozicioj, prelegoj ktp. ŝuldiĝas preskaŭ ekskluzive al la informa aparato de UEA, t.e. de la centraj organoj kaj de la landaj aŭ fakaj informaj servoj de organizaĵoj apartenantaj al UEA. La vero ankaŭ estas, ke ĉiu kampanjo de UEA (Unesko, Jaro de Homaj Rajtoj, Jaro de Internacia Kunlaboro ktp.) kaj ĉiu evento en ligo kun UEA (kongresoj, konferencoj, seminarioj, kandidatigo al Nobel-Pacpremio

KRITIKA PREZENTO DE MISPREZENTA "KRITIKO"

(daŭrigo de p. 127)

ktp.) estas vaste utiligata *ankaŭ* por informado kaj disvastigo de la lingvo.

4. Heroldo asertas, ke "la plej granda parto de la internaciaj eldonaj kaj propagandaj iniciatoj okazas sendepende de ĝi (UEA) aŭ ekster ĝiaj centraj planoj". Kompreneble, la eldonaj iniciatoj kaj realigoj ne apartenas nur al UEA. Feliĉe, ekzistas pluraj efikaj eldonejoj, kiuj meritas ne nur laŭdon, sed apogon de ĉiuj. Alie prezentiĝas la "propagandaj" iniciatoj. Ĉar Heroldo ne povas ne scii, ke preskaŭ *ĉiuj* "iniciatoj" okazas pro la agado de la informa kaj esplora maŝinaro de UEA, la supra aserto povas nur implici la malveron, ke UEA estas sole la centraj organoj, dum la landaj kaj fakaj organizaĵoj, aŭ iliaj informaj fakoj kaj unuopaj kunlaborantoj, troviĝas — ekster UEA!! Nek pli, nek malpli! Sed ili ja estas UEA, *ĉar UEA estas ni ĉiuj, kiuj troviĝas en ĝi kaj kiuj agas ĉie tra la mondo, sur diversaj niveloj, por la realigo de nia komuna celo konforme al niaj komune akceptitaj ĝeneralaj planoj kaj programoj.*

5. Tiu implicita misprezento evidente havas plian celon: se eble krei kaj kojni fendon inter la centraj kaj la landaj aŭ fakaj instancoj de UEA. Tio vidiĝas eĉ pli klare kelkajn liniojn poste, kie Heroldo kvazaŭe "bedaŭras", ke la laboro de TEJO, la veturanta kliniko de IKUE kaj KELI, la "Pedagogia Revuo" de ILEI, la Itala Leĝoprojekto prizorgata de IEF — *do ĉio agadoj de organizaĵoj apartenantaj al UEA aŭ en kunlaboraj rilatoj kun ĝi* — "ne trovis pli fortan eĥon en la informaj organoj en Rotterdam". Denove fendocela implicita malvero, ĉar tiuj ĉi agadoj kaj multaj aliaj pozitivaj atingoj, kiuj meritas mencion aŭ eĉ tutajn artikolojn (vd. ekzemple la grandan du-paĝan ilustritan artikolon pri la veturanta kliniko en "Esperanto" de oktobro 1968, p. 142-3, aŭ la konstantan rubrikon de TEJO ktp.) ja havis kaj plu havos ne nur "eĥon", sed ankaŭ sinceran kuraĝigon. Aliflanke, negativaj fenomenoj aŭ eĉ rektaj fuŝaĵoj — kaj ankaŭ tiaj ekzistas — ne trovos pozitivan "eĥon", kvankam Heroldo verŝajne tion dezirus.

Ne, Heroldo ne sukcesis kaj espereble neniam sukcesos elmanovri antagonismon inter la centraj organoj kaj la landaj aŭ fakaj organizaĵoj. Iliaj membraroj kaj gvidantoj estas sufiĉe saĝaj por ne fali en tiaspecajn kaptilojn. Kaj se estas io por plendi, ili ja scias mem paroli en la ĝusta loko kaj ne bezonas la "redakcion" de Heroldo kiel advokaton.

Nu, verŝajne sufiĉas, kvankam oni povus ankoraŭ longe daŭrigi. Fine, tamen, nur kelkaj pliaj vortoj pri interesa specimeno de

100%-a vero

En Heroldo de la 1-a de majo, 1971, aperis eta informo sub la titolo "Progreso de Heroldo". Ĝi tekstas: "Inter la 1-a de januaro 1970 kaj la 31-a de marto 1971 la abonantaro de 'Heroldo' en la deviza zono kreskis de pli ol 150 pliaj abonantoj." Ne estas kaŭzo por dubi pri la vereco de tiu informo. Ĉu la imp-

reso, do, ne estas, ke Heroldo en tiu ĉi jaro, kompare kun la pasinta, kreskis je 150 abonantoj en la deviza zono? Nun oni relegu la informon tre atente. Se oni ankoraŭ ne rimarkis la artifikon, oni estas misgvidita, sed ĉi-foje per veraj informoj. Kiel? Tre simple tiel, ke Heroldo komparis la staton de abonantoj je la *1-a de januaro* de la antaŭa jaro, kiam ĉiu periodaĵo nepre devas havi malpli da abonantoj por tiu jaro ol en la postaj semajnoj por la sama jaro, unuflanke, kun la stato je la *31-a de marto*, kiam, tute same, ĝi absolute certe devas havi pli da abonantoj ol en la antaŭaj semajnoj por tiu ĉi jaro, aliflanke. Tute pretere: kial Heroldo ne publikigas la precizan nombron de siaj abonantoj kaj entute siajn jarajn kontojn? Ankaŭ privataj entreprenoj kutimas aŭ eĉ devas fari tion.

Kiel oni vidas, oni povas misgvidi eĉ per absolute veraj informoj, se oni kalkulas je malatenta legado. Tamen, tiu ĉi misinformo, kvankam psikologie interesa, neniel tuŝas UEA-n. En mondo de libera konkurado ofte privataj entreprenoj reklamas siajn varojn tiamaniere. Se Heroldo deziras agi simile, do ĝi faru tion, sed ĝi fine ĉesu misprezentadi aferojn en rilato al UEA.

* * *

Eble iuj el la t.n. "estu-paco-esperantistoj" sentos sin "malfeliĉaj" pro tiu ĉi reago. Se efektive troviĝos tiaj, al ili mi anticipe respondas: por ke fakte "estu paco" en niaj vicoj, necesas ne subite "ekmalfeliĉi" pro la defendo de la viktimo, sed multe pli frue riproĉe elradikigi malpravajn atakojn. *Tion postulas justeco.* Kaj por tio ili havis je dispono preskaŭ 10 jarojn en la kazo de Heroldo.

Eble troviĝas unuopuloj, kiuj diros, ke Heroldo rajtas "libere kritiki". Al ili mi anticipe respondas: certe jes, sed necesas distingi inter bonintenca kritiko bazita sur faktoj, kaj misuzo de kritiko por deformi faktojn. Krome: se sub la masko de preslibereco oni arogas al si la neekzistantan rajton dissemi malveron, tiam la *elementa postulo de demokrata preslibereco* estas faligi la maskon por venkigi la veron.

Se iuj pensas, ke la artikolo fariĝis tro longa, al ili kaj al ĉiuj mi diras: kompare kun la amplekso de la dekjaraj misprezentoj, kies krono estis la traktita "kritiko", ĝi estas tro konciza. Neniu kredu, ke por mi estis plezuro perdi valoran tempon por verki ĝin. Necesis fine unu fojon por ĉiam, kvankam dolorige, reagi ne per satiraĵo, kiom ajn sprita kaj esencotrafa, sed per faktoj, ciferoj kaj argumentoj bazitaj sur ili. Ne nur pro justeco aŭ nur pro la vero kiel tiaj, sed en la intereso de UEA kaj de la Internacia Lingvo, kiun ĝiaj organoj klopodas kaj grandparte sukcesas maksimume disvastigi per sindonaj fortostreĉoj, per miloj aŭ eĉ dekmiloj da senpagaj laborhoroj ĉiujare, kio ebligas ŝparadojn kaj racian utiligon de la pli ol minimumaj financaj rimedoj, vere gutetoj en oceano, se oni komparas ilin kun la enormaj kapitaloj malantaŭ la grandaj lingvaj kaj kulturaj imperiismoj. Neniu atendas gratulon pro tio. Eĉ ne simplan rekonon. Sed ankaŭ ne senbazajn atakojn, kiuj nur kreas malconfidon, dissemas defetismon kaj en la nokto malkonstruas tion, kion oni tage konstruas.

Ivo Lapenna

Senpretenda, lingve simpla

Utila por kurs-finintoj



Recenzas Asen Grigorov (Sofio):

La mondo rakontas: 50 rakontoj el 5 kontinentoj. Komp. Theodor Kilian. Třebíč: Osvětový dům, 1970. 46 p. 17 cm.

Duoncento da rakontoj — jen estas la enhavo de la kolekto de Th. Kilian, malnova ĉeĥa esperantisto. Kilian multe korespondis, kaj li faris tion ne por la korespondada ŝatokupo mem. Li korespondis celdirekte. Unu el la fruktoj de lia aktivado estas la kompilo de broŝuro el 46 mallongaj rakontoj, originalaj kaj tradukitaj, diversnaciaj kaj tre variaj. Al ilia nombro la kompilinto aldonis fragmentojn el "Faraono" de B. Prus, "Sep fratoj" de A. Kivi kaj aliajn tekstojn. Iuj el la rakontoj estas karakterizeblaj per intimeco ("Florkronoj el Havajo"), per senafekta sentemo ("Suno por la koro", "Lasta folio"), aliaj senpere ligiĝas kun Esperanto ("Sin'iti Ito"). Pluraj geografiaj priskriboj, leteroj pri moraj kaj popolkutimaj temoj variigas la enhavon.

Ĝenerala pozitiva trajto de la rakontoj estas ilia simpleco. La tuto estas destinita antaŭ ĉio por esperantistoj dezirantaj lingve perfektigi, legante interesan legaĵon. La tuto estas zorge redaktita — tion pravas la bona, ja senriproĉa Esperanta lingvaĵo.

Estas konsilinde daŭrigi la eldonon de similaj senpretendaj sed utilaj libroj.

Mendu ĉe UEA: 3 gld. + sendokostoj 10%.

Recenzas Gim Taekeng (Koreujo):

Ni aktoras ... 3 komedietoj, de Marjorie Boulton. Aabyhøj: Dansk Esperanto Forlag, 1971. 36p. 21 cm.

Same kiel la antaŭparolo de la aŭtorino, la 3 komedioj ne pretendas literaturan valoron sed havas la celon nur de pedagogia utiligo. Kaj tial ili estas t.n. legdrametoj aŭ ekzerc-drametoj por la lernado de la esperantistoj-komencantoj. La unua el la tri, "La Participoj" ne estus taŭga por tiuj komencantoj, kies gepatra lingvo ne havas partupon kaj kiuj ne komprenas la nocion pri participoj. La aliaj du estas klare kompreneblaj kaj amuzaj. Kiel unu el la kursgvidantoj mi rekomendas al ili, ke ili utiligu la libron kaj prezentu ĝin al kursanoj en la finkunveno de la kurso.

Mendu ĉe UEA: 2 gld. + sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

du novaj terminaroj: *Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj*, kompilita de Ornitologia Rondo Esperantlingva, (68 p., 3,20 gld.), kaj *Fervoja terminareto Esperanta-serbokroata, serbokroata-Esperanta* (136 p.). La ornitologia verko estas laŭklase ordigita kun indeksoj latina kaj Esperanta. Laŭteman ordigon havas ankaŭ la granda (672-paĝa) brazila verko aperinta bilde en la maja "Esperanto", p. 89: *Esperanto-Português (Conversação)*, de Pandiá Pându. Eldonis ĝin Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en Rio.


Bona ŝanco, de d-ro Werner Bormann, estas unu el tri novaj eldonaĵoj de Stafeto. Ĝia subtitolo estas: "Dek du prelegoj pri la Internacia Lingvo kaj la sociaj sciencoj" (246 p., 13,— gld.). La aliaj estas la nova traduko de *La tempesto* de Shakespeare, el la mano de Kalocsay, kaj popularscienca verko *Estiĝo de la tero kaj de la homo*, de la speleologo Leander Tell (ambaŭ po 7,20 gld.).

Grava laŭ enhavo, kvankam ne laŭ formo, estas nova kompilaĵo de Miyamoto masao: *El Manjoo*, en kiu troviĝas 323 liaj tradukoj el la antikva japana poemaro (110 p., 3,60 gld.). En inversa direkto tradukis Giordano Azzi (Italujo), kiu publikigis en broŝureto 13 tradukojn en la dialekto de Como el originalaj Esperantaj poemoj de diversaj aŭtoroj.

Alia el-Esperanta traduko estas la dua franclingva eldono de Manifesto de la Sennaciistoj: *Manifeste des anationalistes*, de E. Lanti. Fine, la broŝuro *La mesaĝoj de la sinjorino de ĉiuj popoloj* (43 p.) temas pri Maria-honorado en Amsterdam.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.a. 14% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj.

Racia tono de argumentoj



Recenzas Gary Mickle (Usono):

A first foreign language for all mankind, de Bernard Cavanagh. London: British Esperanto Association, 1971. 32 p. Ilus. 21 cm.

Ĉi tiu informbroŝuro donas la bazajn faktojn pri Esperanto kaj trafe respondas la plej oftajn demandojn pri ĝi. La aŭtoro prave atentigas pri la grava rolo de bone informitaj neesperantistoj, kiuj scias la faktojn pri Esperanto kaj kapablas ĝin defendi. La broŝuro tre konvenas por provizi la necesan scion al ili kaj same taŭgas por prezenti nian aferon ĉe gravaj instancoj. Laŭdinda estas la racia tono de la argumentoj de s-ro Cavanagh.

La verko estas dividita en numeritajn sekciojn, kiuj pritraktas diversajn aspektojn de la lingva problemo, la movado kaj la lingvo mem. La enkonduko direktas la leganton al tiuj sekcioj, kiuj plej intime rilatas al liaj intereso. Kvankam enestas bonaj prilingvaj klarigoj, iom sentiĝas la manko de specimena teksto en Esperanto kun angla traduko, kio interesus grandan nombron da lingvaj legantoj. Sufiĉe lukse presita (kun interesokaptaj fotoj), la broŝuro per sia ekstera aspekto faras favoran impreson. Esperinde nur estas, ke la prezo pro tio ne estos sufiĉe alta por limigi la utiligeblecon.

sekureco ne ve


Kompato ne kortuŝu vin, ĉar baldaŭ malaperos la doloroj. Sed la vakcin-protekto helpas la infanon plenkreski en mondo, kie ne nur medicino kaj vakcinoj, sed ankaŭ elektroniko estas mobilizitaj por nin protekti.

Tiurilate Philips havas tre elokventan historion. Ĝi komenciĝis antaŭ preskaŭ okdek jaroj per simplaj inkandeskaj lampoj. Hodiaŭ Philips produktas sennombrajn tipojn de lampoj, inter kiuj multaj por gardi nian sekurecon.

Sed ankaŭ per siaj telekontrol-ekipaĵoj, radaro, X-radiaj sistemoj kaj televido en fermita cirkvito, Philips kontribuas al plisekurigo de nia mondo. La scio, ke eble homaj vivoj estas riskataj ĉiam stimulis Philips fari siajn produktojn eksterordinare fidindaj. Homamo? Jes ! Sed samtempe sobra merkantilismo.


Esperantlingva katalogo priskribanta la modernan programon de Philips en X- radiaj kaj medicinaj aparatoj estos baldaŭ havebla. (Philips Medical Systems Division, Eindhoven - Holland)

Elektroniko helpas konstrui mondon pli feliĉan kaj pli sanan.



La "EVOLUON" en Eindhoven, Nederlando, estas konstanta ekspozicio, kiu montras la disvolviĝon de scienco kaj socio. Ĝi estis konstruita por memorigi la 75-an datrevenon de la fondiĝo de Philips.

nas per si mem



PHILIPS

LOKE — FAKE

LOKE

Bulgarujo

- La oficiala turisma oficejo Balkanturist organizas unuafoje "Esperantan ripozon inter amikoj" por junio, julio kaj aŭgusto 1971 po 12 tagoj 6-foje. "Balkanturist" atendas partoprenon de eksterlandaj esperantistoj. (Adreso: Balkanturist-Sofio, bulv. Dondukov 2, Bulgarujo.)
- La fako Socia Nutrado kaj Turismo de la Departementa Kooperativa Asocio en la distrikto Blagoevgrad unuafoje eldonis 16-paĝan multkoloran turism-an prospekton. Ĝi estas trilingva: bulgara, Esperanta kaj germana. Oni povas ricevi la prospekton ĉe Oktaĵen Kooperativen Sajuz, Blagoevgrad.

Francujo

- Ekde oktobro 1971 komenciĝos kursoj pri Esperanto en SPLEF (Societo por la Disvastigo de Fremdaj Lingvoj en Francujo), kion atingis s-ro Jean-Louis Rousseau. La duagradan kurson gvidos s-ro Jean Thierry, estrarano de UEA.

Germana Demokratia Respubliko

- En la ĉefurbo de GDR de la 25a ĝis la 30a de marto 1971 okazis simpozio de esperantistoj el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, GDR, Hungarujo, Pollando kaj Sovetunio. Enkonduke parolis prof-o M. Isaev, sovetunia lingvosciencisto, pri la graveco de la Internacia Lingvo en la nuna epoko de la scienca evoluo.

Grekujo

- La Universitato de Thessaloniki oficiale enkondukis la instruadon de Esperanto, inter la aliaj lecionoj, kiel fakultativan. La unua leciono okazis en marto 1971; ĉeestis krom studentoj el ĉiuj fakultatoj ankaŭ profesoroj. La kursoj okazadas ĉiusemajne dufoje.

Kolombio

- En Kolombio, kie estas nun nur 13 membroj de UEA, oni vidas novan evoluon. La Esperanto-Klubo en Medellín (urbo kun 790 000 loĝantoj) lastatempe organizis korespondkursojn kaj anoncis tion en ĵurnaloj. La Klubo, kies prezidanto estas la direktoro de la lingva fako de universitato, ricevis nombron da leteroj el la tuta lando.

Koreujo

- Pace unuiĝis du organizaĵoj, Korea Esperanto-Societo kaj Korea Esperanto-Asocio, sub la nomo de la unua, kiu estas landa asocio aliĝinta al UEA. La nova, reorganizita Korea Esperanto-Societo eldonis

La Universitato de Gotenburgo. (Vidu ĉe Svedujo.)



la unuan numeron de sia organo "Korea Esperanto" en januaro 1971.

Sovetunio

- Aktiva laboro de esperantista brigado por restarigo de la detruoj en Maĥaĉ-Kala, kaŭzitaj de ter-tremo, impresis la lokan komitaton de "Komso-molo". De tiam la komitato aktive helpas al esperantistaj entreprenoj.

Svedujo

- Sekve de la klopodoj fare de "Inter — Agadgrupo por Esperanto", baldaŭ komenciĝos Esperanto-kurso en la Societo por Kursagado en la Universitato de Gotenburgo. Kvankam nur 24-hora, la kurso estos subtenata de la ŝtato. Speciala informilo kun invito al la kurso estos sendita al proksimume 3 500 geinstruistoj en Gotenburgo.

FAKE

Filatelio

- En la kadro de Pola Filatela Asocio fondiĝis tutpollanda Esperanto-Klubo, kiu inkluzivas ankaŭ ne-esperantistojn-simpatiantojn, kun celo i.a. prizorgi porokazan stampilon en Esperanto kaj kontakti kun eksterlandaj filatelistoj per la Internacia Lingvo. (Adreso de la Klubo: Kraków 1, ul. Wiślna 8, Skr.p. 756.)

Kampado

- La kampadejo "Soebjergkilde" ĉe vilaĝo Ågerup en Danlando nun speciale atendas esperantistajn gastojn. La estro de la kampadejo komencis lerni Esperanton. Kontaktebla ĉe s-ro Regner Knudsen, Fjordgaardsvej 5, DK 4300 Holbæk, Danlando.
- Kampadejo "De kleine wielen" en Leeuwarden (Nederlando) lastatempe eldonis kolorriĉan informilon tri-lingvan (franca, dana, Esperanta). Ĝi estas havebla ĉe: Kampadejo De Kleine Wielen, Rijksstraatweg 12, Tietjerk, Leeuwarden.

Lingvistiko

- En Burg Wartenstein (Aŭstrujo), de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970, okazis simpozio "Al la pri-skribo de la lingvoj de la mondo". La simpozion partoprenis lingvistoj el Aŭstralio, Britujo, F.R. Germanujo, Francujo, Hindujo, Japanujo, Meksiko, Nederlando, Sovetunio, Usono. Ili faris rezolucion dediĉi du jarojn kiel preparan stadion por priskribi la lingvojn en la tuta mondo.

Literaturo

- Aperis italdialekta traduko de 13 poemoj el la verkoj de la proksimume 90 poetoj aperintaj en *Esperanta antologio*. Tradukis ilin s-ro Giordano Azzi. Kvankam maldika, la bele presita poemareto povus doni al itallingvanoj pozitivan impreson pri la Esperanta literaturo.

Muziko

- La "Muzikeldonejo kaj Koncertfondaĵo" en Antverpeno (Belgujo) eldonis dulingvan informilon (Esperanta/flandra) pri la kariljonkoncertoj organizitaj de la Urba Konsilantaro kaj prezentotaj de urbo-kariljonisto Jo Haazen (UEA-fakdelegito pri muziko en Antverpeno). La koncertoj okazadas ĉiun lundon vespere, de la 14a de junio ĝis la 13a de septembro.

Jen nova rubriko, kiun ni baptis "KOMENCO BONA ... ĈIO BONA". Ĝia celo estas prezenti facilan legaĵon al lingvaj komencantoj, do al tiuj, kiuj finis elementan kurson aŭ la unuan lernolibron, sed ankoraŭ ne estas sufiĉe spertaj en la lingvo por ĝui iom komplikan literaturon. Ni esperas, ke ili trovos la novan rubrikon interesa, sed antaŭ ĉio instrua. Eventuale kurs-gvidantoj povos uzi la materialon por siaj kursanoj. Kontribuoj por tiu ĉi paĝo, kiu regule aperos en ĉiu numero de nia revuo, estas ĉiam bonvenaj, same kiel eventualaj komentoj, kritikoj aŭ demandoj.

E.L.M. Wensing, redaktoro

NEATENDITA SUKCESO

Iu belega sekretariino, loĝanta en Aŭstralio, ricevis, en la pasinta jaro, tre grandan pasko-ovon el ĉokolado. Ĝi estis donaco de unu el ŝiaj multaj fraŭlaj amikoj. Sur la bela skatolo, en kiu la ovo estis pakita, ŝi legis: "Farita en Italujo". Kiam ŝi rompis la ovon, ŝi rimarkis, ke ĝi enhavas papereton, sur kiun iu persono desegnis sunon kaj skribis jenajn vortojn: "Tio estas la suno de mia patrujo. Se vi estas bela knabino, kiu sopiras al amo, venu al mia lando. Nia suno kaj mia amo faros el vi veran *belulinon*. Franko Basile, Italujo".

La fraŭlino el Sidnejo tuj komencis ŝpari monon tre diligente kaj finis siajn rilatojn kun sia aŭstralia amiko. Antaŭ kelkaj semajnoj ŝi flugis al la itala ĉefurbo Romo. Rekte ŝi iris al la fabriko de la ĉokoladaj pasko-ovoj kaj petis la adreson de Franko Basile. Li mem malfermis la pordon. La *entreprenema* italo aspektis precize tia, kia ŝi imagis lin en siaj revoj: longa, atleta, kun bela bruna haŭtkoloro, mildaj kaj revemaj okuloj kaj ĉarmaj lipharoj, en du vortoj, la perfekta "latina amanto". Sed, ho ve!, li jam estis edzo, eĉ patro de tri infanoj kaj, post kelkaj monatoj, de kvar.


Li sentis sin en iom embarasa situacio, kaj lia edzino insulte nomis lin amo-aventurulo. Franko energie klopodis *senkulpigi* sin, dirante, ke li skribis la letereton nur por ŝerci kaj sen iu ajn serioza intenco. Sed li honeste konfesis, ke ofte, dum la enpakado de belaj ovoj, liaj pensoj forflugis al belaj knabinoj en malproksimaj landoj, kiuj iam ricevos kaj manĝos la ovojn, kiujn li *ĉiutage* metas en kolorajn skatolojn.

Kiam finiĝis la akraj insultoj de sinjorino Basile kontraŭ ŝia edzo kaj la *timigita* aŭstralia knabino, la atmosfero fariĝis iomete pli agrabla. Sinjorino Basile eĉ invitis la aŭstralianinon por la vespermanĝo. Post tre mallonga tempo ŝi tute forgesis sian ĉagrenon pro la fakto, ke ŝi, dum sia restado en Romo, *senĉese* ricevis petojn por edziniĝo. Tiajn petojn ŝi aŭdis grandparte de junaj viroj, kiuj bruege ŝoforis preter ŝi siajn Fiat'ojn.

Klarigoj:

bel-ul-in-o: persono de virina sekso, kiu estas bela (bela — belulo — belulino).

entrepren-ema: kiu volonte entreprenas ion; kiu *emas* entrepreni.



sen-kulp-ig-i: igi (sin) senkulpa; provi konvinki aliajn personojn, ke oni ne havas kulpon.

ĉiu-tage: en ĉiu tago (tiaj adverbiaj formoj estas tre oftaj en Esperanto; ekzemploj: ĉiujare, ĉiunokte, ĉiudimanĉe, ĉiufoje, ĉiudusemajne, ktp.).

tim-ig-it-a: mi timas = mi sentas timon; mi timigas = mi kaŭzas timon ĉe alia persono kaj tiam tiu persono *estas timigita de mi*. En nia historieto la akraj insultoj de sinjorino Basile *timigis* la knabinon, do ŝi estis *timigita*.

sen-ĉese: sen ĉesi, sen interrompo (ankaŭ tiaj adverbiaj formoj estas multe uzataj; ekzemploj: seninterrompe, senvorte, senprokraste, sename, ktp.).

KNABINO SIMILA AL LA ...

Fraŭlo jam plurajn fojojn kondukis knabinojn al sia gepatra hejmo, sed neniu el ili plaĉis al lia patrino.

Foje amiko konsilis al li: "Serĉu knabinon, kiu iom similas al via patrino, kiu havas la samajn interesojn, agas kaj pensas simile, nu bone, vi komprenas, kion mi volas diri."


Tiel okazis. Li serĉadis longan tempon. Fine li trovis amatinon, kiu multe similis al lia patrino.

"Kaj," demandis lia amiko, "ĉu ĉio en bona ordo?"

"Mi faris precize, kiel vi diris, kaj trovis knabinon tre similan al mia patrino. Ŝi parolis kiel ŝi, pensis kiel ŝi, eĉ kuiris kiel mia patrino kaj fakte mia patrino adoris ŝin."

"Do," respondis la amiko, "kio okazis?"

"Nenio! — ĉar ĉi-foje mia patro ne povis toleri ŝin."



DUA EKSPERIMENTO-GRUPO STARIGITA

Jam de pluraj jaroj laboras kaj kuraĝe ĉiajn problemojn frontas la Kunordiga Konferenco de Maribor, kiun konsistigas la instruistaj Esperanto-asocioj de Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo kaj Jugoslavio. La celo de tiu agado estas efektivigo de komuna lerneja eksperimento pri la Internacia Lingvo. El la sino de ILEI nun kreskis plia kunordiga konferenco, kiun portas belgaj, f.r.-germanaj kaj nederlandaj instruistoj.

En Antverpeno kunvenis de la 5-a ĝis la 7-a de aprilo 1971 25 geinstruistoj el tiuj ĉi tri ŝtatoj. La unua tagorda punkto enhavis, kompreneble, detalajn raportojn pri la situacio de Esperanto-instruado en la koncernataj landoj. Pro la dokumenta valoro de tiuj eroj ni jen vicigas la demandojn kaj respondojn (B = Belgujo, G = F.R. Germanujo, N = Nederlando):

- 1) Kiom da instruistoj estas disponeblaj por instrui la Internacian Lingvon? B: 23, G: 70, N: 50.
- 2) Kiom da instruistoj fakte instruas ĝin? B: 8, G: 10, N: 9.
- 3) En kiom da lernejoj oni instruas ĝin? B: 4, G: 10, N: 9.
- 4) Kiom da gelernantoj ĝin studas nunmomente? B: 20, G: 210, N: 160.
- 5) Surbaze de kiuj dokumentoj okazas la instruado? B: Simple, la instruado de Esperanto ne estas malpermesita kiel "kroma aktiveco". G: Laŭ decido de la kulturministroj de la 11 federaciaj landoj el la jaro 1954 la Internacia Lingvo estas instruebla en liberaj studrondoj ekster la horaro. N: Oni instruas surbaze de reĝina dekreto de 1964 pri Esperanto-ekzameno de instruistoj en mezgradaj lernejoj.
- 6) Kiom da infanoj jam finlernis Esperanton? Ne estis doneblaj klaraj informoj, ĉar ne estas konate, ĉu infanoj post la lernejaj kursoj daŭrigis la studadon.
- 7) Kiujn internaciajn rilatojn havas la gelernantoj? B: individua/klasa korespondado, partopreno en "Graĵoj en vento", G: kiel en Belgujo, krome interŝanĝo de sonbendoj, vizitoj al aliaj landoj, N: kiel en Belgujo.
- 8) Kiujn metodojn oni aplikas por gajni novajn Esperanto-instruistojn kaj kiujn spertojn oni havas? B: individua varbado; ekzistis dum mallonga tempo kurso por instruistoj en pedagogia centro de Lieĝo; G: individua varbado; de post aŭtuno 1970 okazas porinstruista kurso en la distrikto Aachen helpe de la distrikta administracio; influado al instruista sindikato; informado per speciala bulteno; N: ekzistas bulteno speciale por instruistoj; oni aranĝas skriban kurson, kiu preparas por la posta ŝtata ekzameno.

- 9) Kiujn metodojn oni aplikas por esperantistigi la varbitajn instruistojn? B kaj N: vidu sub n-ro 8, G: okazas ĉiujare unusemajna porinstruista kurso en Malsupra Saksujo; multaj instruistoj partoprenas la programitan Esperanto-kurson de Behrmann.
- 10) Ĉu kaj kiel helpas la ŝtato? B: ne ekzistas rekta helpo; G: Malsupra Saksujo disponigas subvenciojn por instruistaj kursoj; Nordrejn-Vestfalio (distrikto Aachen) disponigas sian oficialan bultenon por artikolo kaj kunvenejoj por kurso; N: neniu konstanta helpo.
- 11) Kiun opinion havas la instruistaj sindikatoj pri Esperanto? B: Ekzistas laborgrupo pri Esperanto en sindikato de flandraj instruistoj (ekzistanta de 1969). G: La sindikatoj ĝenerale estas indiferentaj, sed jen kaj jen favoretas esperantistojn (publikigo de informaj artikoloj, postulo pri pagado de Esperanto-instruado). N: negativa sinteno.
- 12) Kiun opinion havas la gepatroj pri Esperanto? B: Oni konstatas ofte favoran sintenon. G: Indiferenta; N: Unu gepatra asocio favoras Esperanton.
- 13) Laŭ kiu programo estas instruata Esperanto? Nenie ekzistas instruprogramo.
- 14) Kiujn lernolibrojn oni uzas? En la tri ŝtatoj oni uzas plej diversajn, el kiuj pluraj tute ne estas kontentigaj.

Ĉi-supraj raportoj estis akompanataj de diskutoj pri aro da detaloj. La duan parton de la tagordo formis la pripensoj koncerne la eventualecon de komuna lerneja eksperimento pri Esperanto. La konferencanoj interkonsentis eklabori por prepari tian eksperimenton, kiu komenciĝu en aŭtuno 1973 (se eblas) en la 4-a lernojaro de la elementa lernejo (Belgujo kaj Nederlando) aŭ en la 1-a lernojaro de daŭriga lernejo (t.e. post 4-jara elementa lernejo) en F.R. Germanujo, respektive. La eksperimento daŭru en ĉiuj tri landoj 3 jarojn. Oni laŭeble uzos samajn lernolibrojn, eventuale la reverkitajn volumojn 1 kaj 2 de Szerdahelyi. Partoprenu la eksperimenton po 5 diversaj lernejoj el ĉiuj tri ŝtatoj. Oni petos universitaton pri scienca akompanado de la eksperimento. Estas planate kunvenigi kelkajn dekojn da gelernantoj post ĉiu eksperimenta jaro al Internacia Lernejo, kies kadre oni demonstros la praktikan valoron de Esperanto i.a. per internacilingva komuna instruado pri diversaj fakoj. En printempo 1972 kunvenos denove delegitoj el la koncernataj ILEI-sekcioj, espereble eĉ kun kolegoj el Britujo kaj Francujo, ĉar kun tiuj ĉi du ŝtatoj la grupo estus ankoraŭ pli grava kaj impona.

La informa efiko de la antverpena konferenco certe estis granda, ne nur en Flandrujo (kie aperis radio-

mencio kaj pluraj ĵurnalaj artikoloj), sed ankaŭ en F.R. Germanujo: La redaktoro de tiu ĉi Lernea Bulteno donis posttagmeze post la finiĝo de la konferenco (do ankoraŭ la 7-an de aprilo) koncizan raporton al la filio de "dpa" (t.e. germana gazetara agentejo) en Bruselo; la 8-an de aprilo oni trovis en *dekoj* da germanaj ĵurnaloj (kelkakaze eĉ titolpaĝe) la informon pri la konferenco kun la akcento pri la jama konsento de la kulturministroj de tri federaciaj landoj de F.R.G.

KONCIZE EL . . .

Francujo — Gravas ne nur vaste kaj verve instrui infanojn, sed ankaŭ paralela konvinkado kaj influado al la gepatroj de tiuj lernantaj infanoj. Tion sukcese praktikas s-ro A. Mathis (F 83 Solliès-Ville, Francujo). Komence de tiu ĉi jaro okazis festo, kiun ĉeestis pli ol 300 personoj (inter ili la urbestroj de La Farlède kaj Solliès-Pont kaj pluraj esperantistoj el Nico, krome ĉiuj distriktaj lernejestroj) por aŭskulti kaj rigardi la junajn esperantistojn, kiuj kantis kaj prezentis teatraĵeton. Poste oni manĝis "reĝkukon" kaj trinkis ŝaŭmovinon en gaja etoso. — Ĉu en aliaj landoj oni simile agas por krei simpatian por Esperanto?

Estonujo — Ĉi-somere okazos Esperanto-kursoj por estonaj pedagogoj. Oni aranĝos elementan kaj daŭrigan kursojn kun po 80 instruhoroj. — Inter la 33 Esperanto-grupoj funkcias pluraj kursoj, kaj oni celas transdoni la gvidadon de kursoj iom post iom al pedagogoj.

Usono — Tutan A-4-paĝon okupas artikolo sub la titolo "Esperanto Helps Make *Amikoj*" en la numero de la 10-a de februaro 1971 de "My Weekly Reader". Rigardon kaptas duonpaĝa terglobo, kiun ĉirkaŭas diverspopolaj figuretoj kaj en kies 16 spacetoj videblas desegnitaj objektoj kun siaj nomoj (ofte tuj kompreneblaj por anglalingvanoj). La kroma teksto donas plej krudajn faktojn pri la Internacia Lingvo kaj eĉ prezentas kelkajn dulingvajn

frazetojn. — La revueto, 8-paĝa, aperas ĉiusemajne kaj celas lernejanonjn ŝajne ĝis la aĝo de 15 jaroj.

Ĉeĥoslovakio — Fine de la pasinta jaro fondiĝis en la kadro de la Pedagogia Sekcio de ĈEA Lingva Komisiono sub gvido de Vuk Echnert. Tiu komisiono konstatas en cirkulero de la Pedagogia Sekcio, ke "la nivelo de la praktika lingva uzo en la lastaj dek jaroj ŝoke malaltiĝis en niaj regionoj". La celo de la Lingva Komisiono estas kontroladi la lingvaĵon de presaj kaj parolaj lingvouzoj; ĝi volas malhelpi lingvofuŝadon. — Estus certe tre utile fondi tiajn komisionojn ankaŭ en alilandaj instruistaj sekcioj kaj en nia tutmonda tegmenta organizaĵo edukista, por ke multtigi tiuj lingvaj eraroj kaj stumbligadoj ankoraŭ vagantaj tra la instrua literaturo.

Islando — En numero 5/1970 de "Menntamáll" (Edukadaj Aferoj), kiun eldonas la instruistaj ligoj de Islando kaj kiun ricevas ĉiuj instruistoj (de elementa lernejo ĝis universitato), aperis kvar-kaj-duonpaĝa artikolo de Baldur Ragnarsson. Sub la titolo (islandlingva) "Kiel statas la Internacia Lingvo?" la aŭtoro prezentas multajn detalojn pri Esperanto ĉerpante ĉefe el "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo" kaj el aliaj CED-dokumentoj precipe koncerne la instruadon de Esperanto en lernejoj. La artikolo finiĝas per alvoko al la Porinstruista Lernejo de Islando enkonduki Esperanton almenaŭ kiel liberan fakon.


Pollando — La 13-an kaj 14-an de aprilo 1971 okazis en Bydgoszcz la 11-a Tutpollanda Konferenco de Esperanto-Instruistoj. La unuan tagon oni aŭskultis grandan aron da referaĵoj de gvidantoj de la pola Esperanto-movado pri la utiligo de Esperanto en la servo al internacia junulara agado. La duan tagon oni diskutis formojn kaj metodojn de kunlaboro inter Pola Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Junularo kaj Lernejoj Esperanto-Rondoj, unuflanke, kaj la junularaj organizoj, aliaflanke. Krome la konferencanoj okupis sin pri nova regularo de la Instruista Sekcio de PEA kaj elektis novan 9-personan estraron de la sekcio, kiun prezidas Józef Toczyski. Partoprenis la konferencon pli ol 100 polaj geinstruistoj kaj gastoj el Bulgarujo, Hungarujo kaj Jugoslavio.

F.R. Germanujo — Kadre de la 49-a Germana Esperanto-Kongreso (en aprilo 1971) okazis jarĉefkunveno de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Post detala raporto fare de la prezidanto oni diskutis pri la estonta agado (kies ĉefa celo estas la efektivigo de oficiala lerneja eksperimento pri Esperanto) kaj elektis novan estraron.

Fondiĝis, en aprilo, bavara sekcio de AGEI. Ĝia ĉefa celo estas malfermi ankaŭ bavarajn lernejojn por Esperanto-eksperimento.

Fine de marto la prezidanto de la nordrejn-vestfalia sekcio de AGEI havis duonhoran interparolon kun la ministro pri kulturaj aferoj en Düsseldorf. La ministro principe konsentis pri aranĝo de 3-jara eksperimento en la 5-a ĝis 7-a klasoj de 3 diversstipaj lernejoj por infanoj inter 10- kaj 18-jaraj. La Esperanto-instruistoj devos mem akiri la konsenton de lernejaj inspektoroj, gepatroj kaj lernejoj.

Junaj
gelernantoj
prezentas
Esperanton
al la publiko.
(Vd. ĉe
"Koncize el...
Francujo".)





57-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Portland (Oregon), 29.7. - 5.8.1972


Alta Protektanto: Governor Tom McCall, Estro de la ŝtato Oregon, Usono.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aperis la Oficiala Bulteno

Sespaĝa, grandformata kun multaj fotoj kaj diversaj informoj aperis la Oficiala Bulteno (unua) de la 57-a UK en Portland 1972. Kune kun la aliĝilo ĉi estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.



La fame konataj kablo-tramoj en San Francisco, la postkongres-urbo, iel kontentigos aventuremulojn.

Antaŭkongreso en Vancouver?

Lige kun la Kanada Esperanto-Kongreso en 1972 la organizantoj konsideras inviti esperantistojn al Vancouver por aranĝo de la antaŭkongreso de la 57-a UK. Vancouver situas 530 kilometrojn norde de Portland sur la teritorio de Kanado.

Reklamafiŝoj haveblaj

La Oregona Departemento pri Ŝoseoj disponigas al la LKK 200 belajn bild-afiŝojn kiel reklamon pri Portland kaj Oregon. Interesitoj povas peti ekzemplerojn ĉe la LKK, 12946 N.E. Hancock, Portland, Oregon 97230, Usono.

Ĝenerala ekskursaj plano

Por la tuttagaj ekskursoj la LKK elektis turisme plej allogajn celojn, ekz-e monton Hood, pacifikan marbordon, akvobaraĵon Bonneville kaj perŝipan veturon sur Columbia-rivero. Krome okazos multaj enurbaj vizitoj kaj promenoj, ekz-e al Lloyd-centro.

Vizito al indiana rezervejo

La delegitino de UEA en Gallup, New Mexico, klopodas organizi okaze de la 57-a UK viziton al indiana rezervejo en Arizona. Petu informojn en Esperanto de: Navajo Tribe, Public Relations and Information, Window Rock, Arizona 86515, Usono.

Unuaj karavanoj prepariĝas

Al la pli frue anoncita internacia karavano de UEA (f-ino Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando) lastatempe aldoniĝis anonco de Brita Esperantista Asocio (140 Holland Park Ave., London W.11, Britujo) pri aviadila grupvojaĝo organizata kunlabore kun vojaĝagentejo Express Travel & Transport Co. Ltd. Ankaŭ Japania Esperanto Instituto (Hongo 2-2-14, Tokio, Japanujo) ofertas favoreprezan veturon al la kongresurbo de la 57-a UK.

Statistiko

Je la dato de la 25-a de majo 1971 aliĝis entute 100 personoj el 22 landoj.

ORGANIZA POTENCO

La Universalaj Kongresoj de esperantistoj estas iusence vera unikaĵo en la homa socio. Tiaj aranĝoj povus esti plene utiligataj kiel eblaj manifestacioj al tiuj, kiuj ne praktike konas la funkciojn de la Internacia Lingvo. En la jena artikolo raportas pri du flankaj okazintaĵoj okaze de la pasintjara UK s-ro Hans Bakker, profesia gvidisto kaj UEA-delegito por Amsterdam.

Dum la pasinta Universala Kongreso en Vieno la federacia prezidanto Frans Jonas diris interalie: Ne atendu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli propran forton.


Kiel pravaj estas tiuj vortoj, pravas la jena okazintaĵo. Grupo da japanaj esperantistoj, kiu partoprenis la Universalan Kongreson, faris postkongresan vojaĝon. La grupo deziris gvidiston, kiu parolas Esperanton. La vojaĝoficejo, kiu ĝis nun estis apatia rilate

al Esperanto, tuj fariĝis aktiva. La efiko estis, ke mi, kiu loĝas en Amsterdam, 1 160 kilometrojn for de Vieno, tuj devis flugi al Vieno por konduki la "klientojn" de Vieno preter Villach, Ljubljana, Venecio, Firenze, Romo, Napoli, Milano, Ĝenevo kaj Dijon al Parizo.

En Venecio unu el la gastoj subite suferis pro interna atako, pro kio li tuj devis esti kondukata al hospitalo, kie montriĝis, ke neniu parolas alian lingvon krom la itala. Feliĉe ni povis disponi pri esperanto-parolanta veneciano, kiu tuj transprenis la lingvajn kaj aliajn zorgojn, pro kio la ceteraj partoprenantoj senzorge povis daŭrigi la vojaĝon. Kompreneble mi ne forgesis mencii tion en mia raportoj por mia turisma kompanio.

Krome mi elprofitis ĉiun okazon por atentigi pri la praktika valoro de nia lingvo ĉe la diversaj eblecoj, kiuj sin abunde prezentis dumvoje. Samtempe tiu vojaĝo demonstraciis, ke ni disponas pri organiza potenco. Validas la penon esplori, kiel ni pli grandskale ekspluatu ĉi tiun potencon.

**HANS
BAKKER**



TEJO

TEJO-redaktoro:
Wim Jansen,
Röntgenstraat
32 A,
Vlaardingen,
Nederlando

DU SEMINARIOJ EN EŬROPO

DE G.E.J.

Se vi volas por unu semajno pli intense *lerni, praktiki, amuziĝi*, unuvorte *vivi*, do nepre venu al Hamburgo la 27-an de decembro 1971! Okazos tie la 15-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, en kiu sub la temo "homo kaj tekniko" diversspecaj aktiveblecoj estos ofertataj.

Estas antaŭvidataj nur malmultaj kaj bazaj prelegoj; la plejparto de la programo konsistos el kunsidoj de diversaj laborgrupoj, en kiuj interesitoj havos la okazon okupiĝi laŭeble praktike kaj eksperimente pri ero el la respektive preferata kampo. Kompreneble tiuj laborgrupoj estos gvidataj de fakuloj; eblaj subtemoj de unuopaj grupoj ekzemple povas esti:

- komputera kalkulado
- pacesplorado
- kosmonaŭtiko kaj socio.

Krom tio estas antaŭvidataj kromprogrameroj (kiuj tamen neniel malhelpu la partoprenantojn uzi sian liberan tempon laŭ propra plaĉo!): kantado, eble popoldancado, promeno tra Hamburgo...kaj "filologia klubo" (por la obstinuloj).

Kompreneble la jam tradiciaj programeroj emfazos la kontinuecon de la Internaciaj Seminarioj: novjara balo, novjara ekskurso, kaj — supozeble — akcepto en la urbodomo.

Individuaj invitleteroj estas riceveblaj ĉe la sekretario de GEJ, Ingrid Maier, D-69 Heidelberg, Hauptstrasse 246.

Vi konstatos, ke ni efektive realigis iugradan ŝanĝon en la koncepto de la Internaciaj Seminarioj, kiel ni

Komisionanoj Claude Nourmont kaj Wim Jansen, piknikantaj post plurtaga laborkunsido de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO, Melun (apud Parizo), pentekoston. Fotis Hans Bakker.



antaŭe intencis. Ĉefa punkto estas, ke la oferto estos pli varia ol en antaŭaj seminarioj. Ĝuste pro la pli granda varieco de la programo, tiu ĉi seminario pli verŝajne donos al ĉiu la eblecon aktivigi en almenaŭ unu speciale ŝatata kampo, kaj tiel allogos pli da partoprenantoj. Por personaj kontaktoj estos sufiĉe da libera tempo, sed preter tio la kromprogrameroj kaj la komuna laboro en eta rondo intensigos la rilatojn inter la seminarianoj.

Invitas la Konstanta Komitato de
la Internaciaj Seminarioj,
Winfried Schumacher, Wim Jansen, Ingrid Maier

POR GVIDANTOJ

Temo: "labori en kaj per organizaĵoj"

Dato: dimanĉvespere la 29-an de aŭgusto ĝis sabato posttagmeze la 4-an de septembro 1971

Loko: Eŭropodomo "Rijckvelde", Sijsele apud Bruĝo, Belgujo

Partopreno ebla por gvidantoj de organizaĵoj kaj estontaj gvidantoj.

Lingvoj: nederlanda kaj Esperanto, samtempa interpretado.

"Labori en kaj per organizaĵoj"

Labori en kaj per organizaĵoj postulas krom persona fervoro ankaŭ klarvidon. Klarvido pri la funkciado de organizaĵoj kaj pri la kaŭzoj de oftaj problemoj. Tiu klarvido estas unu kondiĉo por serĉi solvon. La alia kondiĉo estas: disponi pri scio koncerne ekzistantajn metodojn kaj teknikojn por povi realigi solvojn.

Plie, ĉi tiu seminario ebligas renkontiĝon kun gvidantoj de aliaj organizaĵoj (NEJOj), kaj per tio ebligos kompari problemojn kaj solvojn, agadon kaj rezulton.

Ĉirkaŭ dudek gejunuloj, havantaj aktivan rolon en sia organizaĵo, laboros kun la helpo de la kursgvidantoj dum unu semajno laŭ la jena

Programo:

Preni kiel elirpunkton specifajn problemkazojn, prenitajn el la praktika sperto de la partoprenantoj, serĉi eblajn kaŭzojn; kompari kun la sperto de aliaj organizaĵoj, klopodi pri ĝeneraligo de la atingita kompreno.

Diskuti eblajn solvojn kun la helpo de surlokaj specialistoj kaj materialoj, ekzerci kelkajn aplikeblajn manierojn de solvado (grupdiskutado, projekti organizajn strukturojn, redaktado de revuoj, ktp.).

Informa enkonduko pri internacia kaj eŭropa junulara agado.

Organizantoj: TEJO, NEJO-komisiono, kaj Moderne Jeugdraad (Moderna Junulara Konsilantaro), Minahassastraat 1, P.K. 4098, Amsterdam (Nederlando). Tel.: (020) 55072.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO

La Akademio, post zorga esploro de la demando, oficialigis jenan regulon pri la uzo de la refleksiva pronomo-adjektivo. Ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

REGULO

1. La refleksivaj pronomoj (serio *si/sia*) rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

[Gvidaj ekzemploj]

Vi lavas vin kaj li lavas sin.

Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata por si, ne por la doto.

Ŝia propra patrino forpelis ŝin de si.

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en ilian.

La patrino diras, ke ŝia filino venos kun sia infano.

(1) *La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.*

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

(2) *Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.*

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidiĝis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

Li rekompencis la soldatojn batalintajn por lia savo.

La pastro sentis la pekulon tuŝita de liaj admonoj.

La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

(3) *Marta admiris lian fidon al ŝi (Marta).*

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

2. Foje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj "*kiu(j) est—*", ekz. apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz. *kaste-lo fama pro sia historio*; sed *li ekvidis sian fraton Benjamenon, la filon de lia patrino = B.*, *kiu estis la filo de ...*).

[Gvidaj ekzemploj]

Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.

Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon, faman pro siaj pentraĵoj.

3. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto: ekz. *siatempe* ktp.

[Gvidaj ekzemploj]

Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.

4. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

NEKROLOGOJ

EDWIN JOSEPH BAKER (1941–1971)

Edwin J. Baker mortis tragedie en Los Angeles. Li estis aktiva en la kadro de la Junularo Esperantista de Nordameriko kaj kiel membro kaj fakdelegito de UEA dum la jaroj 1962–1968.

JAN HERES (1904–1971)

Mortis en la 25a de marto 1971 Jan Heres, delegito de UEA por Johannesburg (Sudafriko) kaj kunfondinto de Sudafrika Esperanto-Asocio.

PAVLOVIČ ISTOMIN /ERMAR SVADOST/

Mortis en marto je la aĝo de 64 jaroj sovetunia interlingvisto Pavlovič Istomin, konata per la pseŭdonomo Ermar Svadost. Lia ruslingva verko "Kiel aperos universala lingvo?" aperis en 1968.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 447, 1 junio 1971

DU HEREDAĴOJ

Maurice Lewin

Kiel jam menciite en la maja numero, je la 12a de marto 1971 forpasis en Dunstable (Britujo) s-ro M. Lewin. Li estis unu el la pioniroj de la Esperantomovado. S-ro Lewin naskiĝis en 1884 kaj jam en 1900 li lernis Esperanton. Laŭ la regularo de la Veterana Esperanto-Klubo, oni fariĝas "veterano" post 40-jara scipovo de Esperanto kaj "jubileano" post 50-jara scipovo de ĝi. S-ro Lewin do estis "jubileano" dum 21 jaroj kaj restis fidela ĝis sia morto.

En sia testamento s-ro Lewin destinis, ke UEA ricevu el la heredaĵo sumon de 250,— britaj pundoj (= proksimume 2 175,— guldenoj).

Ni estas dankemaj pro lia fideleco al la afero de Esperanto kaj al UEA speciale.

A.B. Holness

En marto pasinta mortis fidela membrino de UEA, f-ino Annie Beatrice Holness en Morecambe (Britujo).

Dum kaj tuj post la milito pluraj esperantistoj, loĝantaj en Britujo, fariĝis dumvivaj membroj de UEA (tiam IEL). Tiel ankaŭ f-ino A.B. Holness. Dume ŝi ne forgesis, ke por la laboro de UEA ĉiam mono estas bezonata kaj ŝi indikis en sia testamento, ke UEA ricevu el ŝia heredaĵo sumon de 200,— britaj pundoj (proks. 1 730,— gld.).

La nomoj de ambaŭ personoj eniros la Oran Libron de UEA.

E.J. Woessink,
estrarano pri financoj

JARLIBRO 1971, DUA PARTO

La Dua Parto de la Jarlibro 1971 aperos iom pli malfrue, ol antaŭvidite, supozeble post la UK en Londono. La Estrara Raporto, kiun oni pritraktos dum la Ĝenerala Kunsido kadre de la UK, estas aparte jam presita por la kongresanoj.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de septembro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Ĉeĥoslovakio: Oldřich Antoš, Děčín; Vláďa Hasala (VD, JD, FD), Hodonín; Bohuslav Grim (FD), Nové Město nad Metují; Josef Pařízek (FD), Prostějov; Pavel Sittauer, Třebíč; prof-o Theodor Kilian (FD), Trébíč. **Francujo:** Georges Prevot (FD), Nantes. **Hispanujo:** f-ino María-José Morán (JD), Bilbao; José Franquesa (D, FD), Lerida. **Hungarujo:** Ottó Nógrády (FD), Budapest; f-ino Mária Szabó (FD), Budapest; Lajos Szépfalusi (FD), Székesfehérvár. **Sudafri-**

ko: Cobus Zeelie (FD), Uitenhage. **Svedujo:** Kurt Frisk, Örebro; Henry Lundin (VD), Örebro; f-ino Ragnhild Niklasson (FD), Örebro; Einar Dahl, Uddevalla; Ingvar Hansander (FD), Uppsala.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1971)

Brazilo: Tupi Paulista (D, FD bankaj aferoj). **Bulgarujo:** Kazanlik (D, FD financaj kaj kontsciencaj aferoj). **Ĉeĥoslovakio:** Nové Město nad Metují (FD horloĝoj); Třebíč. **Francujo:** Nice (FD turismo); Toulouse (JD). **F.R. Germanujo:** Reinheim-Saar (D, FD religio). **Hispanujo:** Barcelona (FD komerco: radio kaj TV). **Hungarujo:** Budapest (FD literaturo). **Italujo:** Firenze (D). **Kanado:** Laval des Rapides (FD scienco). **Maroko:** Rabat (Peranto, VD). **Nederlando:** Veendam (D, FD); Wildervank. **Sudafriko:** Johannesburg. **Svedujo:** Gnosjö; Krylbo; Örebro (VD); Sundsvall (FD tipografio). **Svislando:** Le Mont (FD privataj aferoj). **Tanzanio:** Dar-es-Salaam (VD). **Usono:** Los Angeles (FD arto).

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Walsh, s-ino C.; Albany, Usono

MEMBROJ—SUBTENANTOJ 1971

213 Banham, s-ro F.R.; Aŭstralio. 214 Farias, s-ro B.F.; 215 Pessoa, s-ro F.N. de V.; Brazilo. 216 Crabtree, s-ro E.P.; 217 Goulding, s-ino E.; 218 Hockey, f-ino M.J.; 219 Murray, s-ro R.; 220 Seddon, s-ino R.; 221 Sinclair, f-ino P.C.; Britujo. 222 Bodson, s-ro C.; Francujo. 223 Lacalendola, prof. A.; Italujo. 224 Bengtsson, s-ro K.; 225 Edvardsson, s-ino S.; 226 Ericson, s-ro Å.; 227 Hedlund, s-ino I.; 228 Johnsson, s-ino M.; 229 Leijder, s-ro H.A.; 230 Lindström, s-ro B.; 231 Nordström, s-ino G.; 232 Persson, s-ro G.; 233 Stenström, f-ino S.; 234 Szabad, s-ro S.; Svedujo. 235 Davis, s-ro R.L.; 236 Harmon, s-ro W.R.; Usono.

DONACOJ (gld.)

Fondaĵo Canuto: Nederlando: J.L. Muller, 6,69; f-ino N. Rietmulder, 15,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 335,54.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: F.R. Germanujo: P. Böhmke, 4,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 140,42.

Ĝenerala kaso: Svedujo: f-ino Agda Olsson, 1380,—. Sumo ĉijara ĝisnuna 3 127,66.

Kampanjo "100 x 100": (Por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum tri jaroj ekde 1971 po 100 gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj.)

33 f-ino P. Oosthoek, Nederlando


34 O. Ginz, Israelo

Patrono A de TEJO: 37 R.H.M. Markarian, Britujo. 38 Motala Esperanto-Klubo, Svedujo.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

KALEN- DARO



Julio '71 — Januaro '72

Julio

- 1-14 Ferio-kursoj, Swornigacie, Pollando
- 1-15 Kampadista renkontiĝo, Balaruc-les-Bain, Fr.
- 4-10 Somera E-universitato, Gyula, Hungarujo
- 4-25 Kulturaj semajnoj, Grésillon, Francujo
- 11-18 Int. E-tendaro, Päijänne, Isoranta, Finn.
- 11-18 Int. Baltmara semajno, Rostock, GDR
- 12-31 Int. E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo
- 14-21 Akropolo '71, Athenai, Grekujo
- 17-27 Int. naturamika renkontiĝo, Abaliget, Hung.
- 17-31 E-istaj laborkampoj, Roccasecca, Italujo
- 17-31 Int. mezlerneja feriado, Toruń, Pollando
- 17-31 Int. junula feriado, Toruń, Pollando
- 19-24 31a hispana kongreso, Alicante
- 21-25 Int. E-seminario, Toruń, Pollando
- 22-25 6a brazila E-seminario, Campos
- 24-31 Int. kristana kongreso, Abingdon, Britujo
- 25-1/8 Feria kurso, Helsingør, Danlando
- 25-7/8 Kulturaj, turismaj ferioj, Grésillon, Francujo
- 26-7/8 Junula tendumado, Kiev, Sovetunio
- 30-6/8 Int. infana kongreso, Romney Marsh, Brit.
- 31-7/8 44a SAT-kongreso, Parizo, Francujo
- 31-7/8 56-a Universala Kongreso, London, Britujo

Aŭgusto

- 2-21 Int. E-kursoj, Pamporovo, Bulgarujo
- 7-8 Ornitologa semajnfino, Hastings, Britujo
- 7-13 Postkongresa ferioestado, Barlaston, Brit.
- 8-12 Postkongresa ekskurso al Exeter, Britujo
- 8-13 Postkongresa ekskurso al Skotlando, Brit.
- 8-14 Int. junulara kong. de TEJO, Edinburgh, Br.
- 15-4/9 Studsemajnoj, Grésillon, Francujo
- 28-29 Japana kongreso, Tokio

Septembro

- 4-10 Itala kongreso, Marina di Grosseto
- 5-11 Eŭropa feriosemajno, Fürigen, Svislando
- 5-11 TEJO-seminario, Strasbourg, Francujo
- 6-19 Int. E-ferioj, Pamporovo, Bulgarujo
- 17-30 Int. feriado, Międzygórze, Pollando
- 24-27 Ĉeĥa kaj slovaka renkontiĝo, Vsetín

Oktobro

- 1-3 Aŭstra-itala-jugoslavia renkontiĝo, Ljubljana
- 2-9 4a pupteatra festivalo, Zagreb, Jugoslavio
- 17-23 Aŭtunaj feriaj kursoj, Aarhus, Danlando
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (Zam. naskiĝis en 1859)
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 27-3/1 15a int. seminario de GEJ, Hamburg, FRG
- 31 Kotizoj de Universala Kongreso altiĝas

Januaro

- 2-8 18a aŭstralia kongreso, Melbourne

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Mankas al mi nur kelkaj numeroj de *Esperanto triumfonta* de la jaroj 1921-22. Kiu povos helpi min? Ramón Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Ricevi librojn (anglajn, francajn), bildkartojn (artaĵojn), diapozitivojn kontraŭ gramofondiskoj, diapozitivoj ktp. deziras Jaroslav Matvijiŝyn, do Vostrebovna, Kiev 1, Sovetunio.

33-jara lingvinstruisto kaj verkisto serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj pri enigmoj de arkeologio, prahistorio, pri ebla ekstertera inteligenta vivo, pri estonteco de nia mondo.

Kiu cedos aŭ revendos la unuan parton de "Gvidlibro por supera ekzameno" (redaktis A. Pechan)? Bonvolu skribi al Mikelo Englebert, 47 rue Albert 1er, B 4280 Hannut, Belgujo.

Joseph Casto (Meksiko) anoncas novan adreson: Apartado 32-76, Guadalajara 6, Jalisco, México.

Aĉetus fotografilon Rectaflex nudan aŭ kun objektivo(j). Cnudde, F 38 Meylan, rue Le Poulet 22.

Nur Interstene korespondas Milivoj Manko: Ŝentilj 118 (pri Mariboru), Jugoslavio: lingvo Esperanto.

Por fari ekspozicion je la naskiĝtago de UN, oktobre, mi deziras ricevi gazetojn en ĉiuj lingvoj (aŭ dialektoj) de la mondo. Oni petas kunsendi etikedon kun: nomo de la lingvo aŭ dialekto; regiono, kie ĝi estas parolata; nombro de parolantoj; familio, grupo aŭ branĉo, al kiu ĝi apartenas. Adreso: Francisco Corrêa Neto, Rua 15 de Novembro 144/603, Niterójo (RJ), Brazilo.

Poŝt-striko Britujo 1971: La privata poŝt servo Post-Haste uzis markojn kun teksto en L.I. Serio neuzita aŭ uzita sur koverto 4,20 GM + 0,50 GM (afranko). Diversaj E-poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj liverablaj. Neussner, D-1 Berlin 62, Dominicusstr. 40.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

KORESPONDEMULOJ

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

ATENTU!

ANTAŬ AŬ POST LA LONDONA KONGRESO

VIZITU KEIGHLEY-n,

*la naskiĝlokon de la
brita Esperanta movado kaj
mond-faman Brontë-an Distrikton.*

**LA KEIGHLEY-a ESPERANTA SOCIETO
BONVENIGOS VIN !**

Por broŝuro skribu al:

Town Clerk,
Town Hall,
Keighley,
Yorkshire,
Britujo.

Kongresanoj al la U.K. Londono!

Vi povos helpi finance al UEA per transdono de uzitaj poŝtmarkoj al la giĉeto de UEA dum la U.K. Anticipan dankon!

Ĉu vi jam legis?

IMPERATIVOJ DE LA VIVO de H. Rohden

Moderna filozofo en la moderna mondo. Li montras la vojon al paco kaj feliĉo.
Ĉe Libroservo de UEA — 2,70 gld.

LINGVOFAKAJ GESTUDENTOJ

finantaj en la nuna lernojaro la I-an aŭ II-an studjaron kaj intencantaj en la sekva studjaro daŭrigi la studadon en la Budapeŝta Universitato akceptonte ankaŭ la fakon "ESPERANTO, LINGVO kaj LITERATURO" sin anoncu al la adreso:

Filozofia Fakultato de ELTE
Ĝenerala Lingvistika Katedro,
Esperanto-fako, **Budapest V,**
Pesti Barnabás I-3.

Limdato de sinanonco: la 1-a de aŭgusto, 1971.

RETORIKO

**3-a
eldono**

KUN APARTA KONSIDERO AL ESPERANTLINGVA PAROLARTO

DU PARTOJ: I. LINGVO — II. RETORIKO

**Verkita originale en la Internacia Lingvo de prof. d-ro Ivo Lapenna
Antaŭparoloj de Reto Rossetti kaj G. Waringhien**

Nun presata
Aperos antaŭ la U.K. en Londono
Tole bindita, 294 p.

4 500 ekzempleroj de la Unua kaj Dua
eldonoj jam delonge forvenditaj
Prezo 20 gld. aŭ egalvaloro

Escepte favora prezo por antaŭmendoj antaŭ la U.K. en Londono (t.e. antaŭ la 31-a de julio 1971 — decidita la dato de la pago): 15 gld. aŭ £1,75 aŭ egalvaloro por mendoj de unuopaj ekzempleroj; 11 gld. aŭ £1,30 aŭ egalvaloro ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj. (Por nederlandanoj aldoniĝas al la supre menciitaj prezoj 4% da impostoj.) En ĉiuj kazoj bv. aldoni 10% por la sendkostoj. Antaŭmendoj estas akceptataj nur kun samtempa pago de la prezo kaj sendokostoj.

Antaŭmendojn kun la pagoj bv. sendi aŭ al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando (ĝiro poŝta 378964) aŭ al la aŭtoro, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx HA9 8TF, Britujo.

Prof. G. Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, skribas en la antaŭparolo: "En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla libro tiel science redaktita, tiel oportune utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko."

En la Rimarko pri la Tria Eldono la aŭtoro skribas: "Kiel aŭtoro mi havas la kompreneblan esperon, ke Retoriko estos same bone akceptita de la novaj legantoj, kiel ĝi estis de la antaŭaj; kiel multjara laboranto de la Internacia Lingvo mia sola deziro estas, ke ĝia enhavo inspiru kaj stimulu al pli konvinka kaj sindona agado por Esperanto."

CALAIS, LA UNUA "TRANS-MANIKA" HAVENO EN KONTINENTA EŬROPO



El la 8 000 000 da pasaĝeroj, kiuj transnavigis Markolon en 1970, 2 500 000 trapasis la Kalezan havenon. La situo de Calais, la unua haveno en kontinenta Eŭropo por la "trans-Manika" trafiko, fortikiĝas de jaro al jaro.

Ankaŭ vi malkovru la facilaĵojn prezentitajn de la Kaleza haveno por vojaĝantoj.

Calais, la unua haveno por pasaĝeroj en kontinenta Eŭropo estas ankaŭ la sola, kiu povas proponi samtempe rapidecon de transmariĝo kaj grandan nombron da servoj.

Samkiel la 2 500 000 vojaĝantoj elektintaj Kalezon en 1970, vi estos logataj de la rapideco transmariĝa (de 30 min. minimume ĝis 1 h. 30 maksimume), la bonkvalito kaj diverseco de la servoj (kion ajn vi elektu: teraplanon, pasaĝerŝipon aŭ pramŝipon, kiun ajn trapasotan urbon vi elektu: Folkestone, Dovro aŭ Ramsgate) kaj la ofteco de la transveturoj (de 14 servoj dum la vintraj monatoj ĝis 76 servoj dumsezone kun foriro kaj alveno de pramŝipo ĉiuhore tage kiel nokte).

Kaj Calais krome proponas al vi la teraplanon, ultrarapidan transveturan rimedon.

Vi ankaŭ provu transmariĝon tra Calais:

CALAIS – FOLKESTONE

CALAIS – DOVRO

CALAIS – RAMSGATE



PARTOPRENONTOJ EN LA 56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

*Por iri al LONDONO okaze de la Universala Kongreso,
bone pristudu vian vojplanon:*

*Tra CALAIS, unua "trans-Manika" haveno por pasaĝeroj,
ĉio fariĝos pli facila.*